


UKRAINA STELO

GAZETO de UKRAINAJ ESPERANTISTOJ

n-ro 4, 2025



UKRAINA STELO

ENHAVO

LA MILITO

Ternopilo en funebro3

A. Dron' — nova talento5

MOVADO

UK en Brno10

Ternopilo'199513

KRIMEO ESTAS NIA

Hurij Korniljev: “Mi ne volas esti implikita
en la krimoj de Putino”15

HISTORIO

V. Višivanij — ĉu Ukraina monarĥo?20

ORIGINALA POEZIO

P. Palivoda "Ploras la ĉielo"23

JUBILEOJ

“Vsesvit” — 10024

Jaro de V. Eroŝenko26

ESPERANTO — MALESPERANTE

V. Eroŝenko, 2 poemoj29

MODERNA UKRAINA PROZO

Maria Matios “Dolĉa Darinjo”31

UKRAINIA ANTOLOGIO

S. Rudanskij “Hej, bovoj!”35

V. Barka “Flava Princo”37

IN MEMORIAM

M. Kriveckij42

D. Cibulevskij45

Gazeto de ukrainaj esperantistoj
fondita de Oresto Kuzma en 1913
Aperas trimonate. N-ro 4, 2025

La numero estas finkompilita
03.12.2025

Pri la enhavo de la leteroj kaj
artikoloj respondecas la
aŭtoroj mem. La redaktoro
havas rajton malpligrandigi la
materialojn.

Por urĝa kontakto telefonu:
(063) 622-7644 Poŝta adreso:
65045 Odeso, p/k 131,
Ukrainio

Retadreso:
vpayuk@yahoo.com,
tourmaestro79@gmail.com

Redaktado: Ihor Glagolevskij
kaj Viktor Pajuk
Komputilaj laboroj:
Ihor Glagolevskij



Sur la kovrilo: kolaĝo de Niko Voloŝin. Li aŭtoris ankaŭ bildojn por la E-traduko de
“Flava princo” de V. Barka.

La milito

Ĉi-tiu numero de Ukraina Stelo estas la lasta en la jaro 2025. Kiel kutime, ĝi enhavas materialojn, rilatajn al la nuna milito, informo pri historio kaj estanteco de E-movado en Ukrainio. Estas ankoraŭ unu atesto de la fakto, ke okupita Krimeo ĝis nun estas nia. Vi povas legi originalan poezion, ankaŭ konatiĝi kun pecoj de tradukita klasika kaj nuntempa ukraina literaturo.

Novembro estas monato de rememoro pri viktimoj de terura malsatego en Ukrainio – Holodomoro (p. 37).

Ternopil vekigis frue frumatene kaj ekstremis pro amasa atako de moskoviaj bomboj, misiloj, spavoj. S-ro Taras Kokovskij, pastro de la Ukraina Lutera Eklezio, esperantisto (ekde 1979), raportas de la esplodejo.

Ternopilo en funebro

*Redonu al ili laŭ iliaj faroj
kaj laŭ iliaj malbonaj agoj;*

*Laŭ la faroj de iliaj manoj
redonu al ili;*

Redonu al ili, kion ili meritas.

(Psalmo 28:4)

Hodiaŭ mi vizitis la lokojn de la tragedioj en nia Ternopilo... Ne sufiĉas vortoj por esprimi miajn impresojn pri tio, kion mi vidis... Mi parolis kun homoj... Ili venadas ĉi tien dum la tuta tago – plenkreskuloj, infanoj, konatuloj kaj amikoj de la viktimoj... Ĉi-hastaj demandas la loĝantojn pri siaj amikoj, volas scii almenaŭ ion pri ilia sorto. Membroj de la komisionoj kun la loĝejposedantoj kalkulas la kaŭzitan damaĝon. Loĝantoj kaj servajlaboristoj kovras la rompitaĵojn fenestrojn de la loĝejoj per filmo kaj lignerplato.

Volontuloj invitas homojn varmiĝi kaj manĝi. Homoj ekscias pri la detaloj de tiu terura mateno de



atakatestantoj. Multaj havas malĝojajn vizaĝojn kaj okulojn plenajn de doloro kaj larmoj. La domo, nigrita de fajro kaj fumo, estas terura en sia nigreco. La polistireno, kiu izoligis la murojn, forbrulis ĝisfunde. Grupo da infanoj kolektiĝis apud la ruinoj de unu el la domoj. Larmoplena knabino

diras, ke ili revenas ĉi tien por ekscii pri la sorto de la malaperinta Sonjo.


La maŝinaro funkcias, savantoj forigas la rubon jam la duan diurnon kaj serĉas viktimojn. De tempo al tempo aperas ĵurnalistoj kaj amaskomunikilaj reprezentantoj, fotiloj klakas... Psikologoj kaj ambulancoj deĵoras... Akvo- kaj gas-teknikistoj laboras apud la domoj.

Povas ankaŭ esti problemoj en ŝajne nedifektitaj de ekstere domoj – la eksplodondo povas difekti gasajn kaj akvotubojn, precipe ĉe la kolektiloj, do por restarigi akvoprovizon, kaj precipe gason, necesas kontroli la funkciadon de la tuboj en la apartamentoj por eviti problemojn. La plej eta detalo povas fariĝi danĝero.

La tago finiĝas. La urbo estas kovrita de mallumo. La silenton rompas generatoroj apud butikoj. Trolebusoj haltis “kunligitaj”. Nur apud la domoj, difektitaj de moskoviaj raketatakoj, la ĉirkaŭaĵon lumigas la lumoserĉiloj de la savantoj. Ili laboras kiel formikoj... Jam memstaraj... Preterpasantoj disiĝis al siaj hejmoj, kiujn ili havas dank’ al Dio. Kaj multaj el la viktimoj

jam ne havas ilin. Do, en unu momento, ilia hejmo kun karaj muroj, ilia varma familia nesto perdiĝis. Estas timige, dolore, amare.

La kaprobarbuloj el la marĉoj volas elŝiri niajn korojn el niaj brustoj per tiaj krimoj, turmenti niajn animojn per doloro kaj perdo, peli nin en malesperon kaj seneliron. Sed ili ne sukcesos, ĉar ni jam trinkis la kalikon de nia doloro ĝisfunde, ni estas saturigitaj de ĝi, ni trapasis la fajron kaj ne donos al ili tion, kion ili volas. Ni fariĝos iliaj tombofosistoj, enterigistoj.



Nuntempe, nia suna kaj komforta urbo funebras, ĉar tiel endas. Ni priploros niajn mortintojn kaj denove leviĝos kun la slogano – Moscovia delenda est! Brila memoro al la loĝantoj de Ternopilo, viktimoj de la atakoj de la okupantoj la 19-an de novembro.

p. Taras Kokovskij

Arturo Dron'

Ukrainaj defendantoj estas ekstreme talentaj kaj, malgraŭ servado ĉe la fronto, sukcesas verki. Unu el ĉi tiuj batalantoj estas Arturo Dron' (n. 2000). Lia unua poemaro (Komunloĝejo № 6) aperis kiam li havis deknaŭ jarojn, la dua (Tie ĉi estis ni) – je dudek du. Inter ili – la komenco de plenskala invado, interrompitaj studoj en la magistra grado ĉe la fakultato de ĵurnalismo en Lviva universitato kaj la unua sperto pri bataloperacioj, profunda vundo en oktobro 2024, kaj denove Lvivo – kuracado kaj resaniĝo. Kromnomo *David* – honore al la biblia Davido.



Estis nome lia poemo, dediĉita al lia falinta ĵurfrato, kiun citis la itala ĉefministro Giorgia Meloni ĉe gazetara konferenco kun la ukraina prezidanto V. Zelenskij la 21-an de februaro en Kijivo, por ke homoj daŭre skribu kaj parolu pri ĉi tiu milito eksterlande, por ke pli kaj pli da homoj lernu pri ĉio ĉi el nia kreskanta nombro da atestoj. La poemo, kiun Meloni citis, estas dediĉita al la forpasinta O. Kobernik. Oleksandr Kobernik (kromnomo Dok) estis konata instruisto kaj pastro el Lvivo, psikologo, patro de 3 infanoj. Kaj li ankaŭ havis la rangon de supera serĝento en la Armeo. “La 20-an de oktobro, dum peza tanka bombado de niaj pozicioj, mi estis ŝokita, pluraj soldatoj estis vunditaj, kaj tri, bedaŭrinde, mortis. Kaj tio estis la unua fojo, ke “Dok” ne helpis siajn ĵurfratojn, ĉar li ne postvivis tiun bombadon”, – rememoras Arturo.

La poemoj de Dron' estis tradukitaj en la italan, francan, anglan, litovan, polan, belarusan lingvojn. Cetere, oni ankaŭ petis permeson por rusa traduko je iu poezia festivalo en Sankt-Peterburgo. Arturo, kompreneble, rifuzis. Sed kiam la redakcio de la “Ukraina Stelo” turnis sin al la poeto, li “jesis” fulmrapide!

“Hemingway scias nenion” (2025) estas la unua kolekto de mallonga prozo de la ukraina verkisto, “soldata atesto”, arta interpreto de la milita sperto per fragmentaj tekstoj, sonĝoj kaj memoroj. Antaŭnelonge brita eldonejo “Jantar Publishing” akiris la rajtojn eldoni la libron en la angla, kaj

ĝi aperos aŭtune de 2026.

La Kijiva Libro-Arsenala Foiro anoncis la gajnintojn de la CELA-projekto (Konektante Junajn Literaturistojn) kaj nun ĉapitro el la libro estos tradukita en 9 lingvojn, kun la espero, ke ankaŭ kelkaj el ĉi tiuj tradukoj iam estos kronitaj per libroj. Nia redakcio decidis subteni Arturon per ĉi suba esperantigo en disvastigado de ukraina moderna literaturo.

Arturo Dron'

Pluvivu l' Am' ĉe l' fina lim',
simila al
rubusa viv'.
Serĝenta sindonec'.
Infana, hunda, kora.
La ploro – ĝin
mi ne elploru.

Videblas lim',
skizeblas klara spur'.
Tenadi limojn
en konkorda tono.
Kaj resti en oktobro sen futur'.
Laŭ la ordono.

Ĉar tiu Am',
malakro de tranĉil',
amara Am',
jam fariĝanta via,
sur tiuj tenas sin,
estantaj sur la lim'.
Kaj tiuj,
trans la limo.

Kiam ni demetas niajn kirasveŝtojn,
kaskojn, pizmantelojn, jakojn, gantojn,
kaj manĝas mandarinojn apud la ferhejtilo,
kaj similiĝas al infanoj,
foje mi pensas,
ke vi estas ie en la najbara ĉambro.

En la vilaĝo
iu el lokaj virinoj
diris al infano: "Fileto."

Sed ĉiu el ni
retrorigardis.

Mi vidis, ke la vazo kun freŝaj floroj
falis.
"Mi tuj ordigos," mi diris
al la foto sur la kruco.

Mi levis la vazon, kaj tie
estis letereto:
"Leporeto, feliĉan datrevenon al ni.
Mi amas vin."

Elukrainigis Petro Palivoda

Arturo Dron'

Du linioj sur Meĉnikova strato

En Lvivo, falintaj soldatoj estas entombigitaj kontraŭ la akuŝejo. La fenestroj de la malsanulejo Sankta Anna preteratentas la Marsan Kampon, kaj la krucoj sur la kampo frontas al la fenestroj. Venantojn al vivo forlasantojn ĝin apartigas du linioj de la Meĉnikova strato. Se vi moviĝas de Liĉakivska strato malsupren al Pekarska strato, vi trovas vin ĝuste meze.

Mi unue vidis la tombon de Slavĉjo kun kromnomo Batum, januaro de 2023 kaj tuj pensis: ĉi tio devus esti mia kavo. Li estis enterigita en mia kavo. En decembro de 2022, dum mi estis en batal servo en la Serebrjanka arbaro, mi elektis kie mi staros ĉe la posteno. Kaj mi diris, ke mi ne bezonas esti anstataŭigita ĝis la vespero. Sed Slavĉjo venis du horojn poste kaj sendis min teumi, kaj dume li anstataŭigos min. Kvardek minutojn poste, rusa obuso alteriĝis sub arbon kvar metrojn for de la fosŝirmejo, la fragmentoj trafis ĝuste tiun lokon, kie mi devis stari ĉe la posteno, sed staris Batum. Li paŝis en mian postenon, akceptis miajn fragmentojn, kaj kuŝiĝis en mia kavo.

Tiu ĉi penso eĉ ne timigis. Nur klara bildigo. Multaj el ni pensis pri ebla morto, foliumante tra diversaj ebloj. Estas malfacile veni al la Marsa Kampo dum ferioj, viziti viajn ĵurfratojn kaj ne pensi, ke eble vi kuŝos ie en la sekvaj vicoj. Sed ankaŭ tio ne temas pri timo. Ĉar vi rigardas la antaŭajn vicojn kaj rimarkas, ke ankaŭ vi povus esti kuŝinta tie, jam delonge. Sed ankoraŭ ĉi tie, inter la akuŝejo kaj la tombejo. Ĉe la strat'ransirejo.

Por la unua fojo, mi devis trakti mian eblan (garantiitan?) morton kun malvarma praktikeco en oktobro de 2022. Estis malfacila tempo de la unuaj gravaj perdoj por la 215-a bataliono. En nia kompanio, Dok, Bomĵ kaj Bazuka tiam jam mortis, kaj estas neeble listigi ĉiujn viktimojn. Ĉiutage, la vunditoj estis deprenitaj de la pozicioj, kaj poste la mortintoj. Mi tiam havis konversacion, sen kiu mi ne povus trankviliĝi.

Miaj familianoj ne sciis, ke mi estas je nulo*, mi decidis diri al ili poste, post reveno de ferioj. Kaj antaŭ tio mi diris, ke ni postsekvas “seriozajn soldatojn” kaj fosas tranĉeojn por ili. El niaj parencoj pri tio sciis nur Serhij – mia onklo, kiu batalis en la 2014-a. Do, mi devis paroli kun li. Li devus promesi: se okazos io – li aranĝu mian entombigon ne en Pidmiĥailivci, la vilaĝo de mia infanaĝo, sed en Lvivo, la urbo de mia vivo. Sur la Marsa Kampo, kie estas ĉiuj niaj uloj.

Kompreneble, mi ne vere planis morti, sed mi devis diri al li por, se okazos io la plej malbona.



– Tio ĉi gravas por mi, – mi diris, – promesu al mi.

Li promesis.

Tio ĉi estas tre persona. Iu pretigas sin, ke li certe ne mortos. Kaj iu diras, ke estas pli facile tuj akcepti sian morton. Ankoraŭ aliaj tute ne pensas pri ĝi.

La uloj kaj mi pripensis tion ĉi. Foje ni parolis, ŝercis, ekzemple, pri la fakto, ke la militserva rotacio por ni brilas nur sur la enteriga kampo.

Puĥ, Bul kaj mi iris al la tombo de nia ĵurfrato en alia urbo. Tie oni starigis por armeano grandan monumenton kun plenalta figuro.

Bul diras:

– Se mi troviĝos sur la Marsa Kampo, Dio gardu vin, se vi starigos tian monumenton por mi.

– Ho, jes, – ni respondas, – bonege. Ni certe starigos ĝin.

– Neniel.

– Ni diros: “Anĉjo revis pri tia honorinda granda monumento post sia heroo morto, kaj ni ne povis ne starigi ĝin”.

– Vi estas fiaĉulo.

– Sed ni igos vin aspekti atlete. Kun muskoloj kaj reliefa abdomeno.

– Nu, konsentite, kun reliefa abdomeno.

Estis por mi grave rigardi tion ĉi sobre. Mi estas nek pli bona nek pli malbona ol multaj homoj, kiuj pereis. Mi ne meritas vivon pli ol iu ajn alia. Ĉiuj meritas ĝin, krom la rusoj. Mi povas morti same kiel iu ajn el miaj ĵurfratoj. Mi ne volas tion, mi ne pretiĝas por ke ĝi certe okazos, sed mi ne diras al mi mem, ke mi estas iel asekurita. En milito, la distanco de vivo ĝis morto ŝajnas tre mallonga. Same kiel la Meĉnikova strato. Jen estas vivo, kaj post du linioj estas morto. Iuj du linioj, kaj jen fino.

Sed tiaj pensoj nur funkcias kun via propra morto. Vi povas pensi pri ĝi kaj timi ĝin. Vi povas ridi pri ĝi. Vi ne povas kredi je ĝi. Nenio el ĉi tio funkcias kiam iu alia mortas. Tio estas probable la plej malbona. Tiam ni estas klare videblaj ĉe la entombigo. Malantaŭ la fumkolono de senĉesa fumado. Malantaŭ maljuniĝantaj vizaĝoj. Malantaŭ senhelpaj rigardoj. Jes, iliaj entombigoj estas nia senhelpeco. Kvazaŭ iu kuŝas en via kavo. Kvazaŭ iu akceptas viajn obus-fragmentojn. Kvazaŭ iu transiras la straton.

Esperantigis V. Pajuk

*nulo – (ĉi tie) la linio de batalkontakto

La 110-a UK en Brno



La 110-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Brno inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto 2025, estis unu el tiuj momentoj, kiam la movado ekbrilas per sia vera vivo. La urbo eksonis kvazaŭ vasta scenejo: ĉirkaŭ 1250 homoj el pli ol sesdek landoj alvenis kun siaj propraj historioj, voĉoj kaj esperoj, sed parolis en komuna kaj surprize intima lingvo – ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la spirito de scivolemo, respekto kaj sincera interkompreno.

La programo malfermiĝis kiel granda, multtavola libro. Matene oni sidas en la ĉambro de la Komitato, kie pezas la vortoj pri strategio, direktoj, estonteco. Post tagmezo jam atendas koncertoj, improvizitaj kantoj, ridetoj, hazardaj renkontiĝoj en la koridoroj. Brno dum tiuj tagoj pulsas – seriozo kaj gajo, laboro kaj festo, ĉio fluadis unu en la alian kiel natura ritmo de viva komunumo.

La ukraina ĉeesto estis sentebla, kvazaŭ ni venis ne okope, sed kun la energio de tuta popolo. La budo de la Ukraina Esperanto-Asocio “UkrUA” staris modeste, sed allogis; homoj haltis, demandis, ridetis, aŭ simple volis esprimi subtenon. El niaj du prelegoj, la kunlabora prezento pri Vasil Eroŝenko – farita kune kun profesoro el la Universitato de Lesja Ukrainka – montris sin aparte riĉa. La salono estis plena ne nur je literaturŝatantoj, sed ankaŭ je tiuj, kiuj serĉas pli vastan vidon pri kulturo, identeco kaj vojaĝado tra mondoj. Oni povis preskaŭ senti, kiel Eroŝenko mem, delonga vaganto inter popoloj, revenas al la internacia memoro.

Sed estis unu momento, kiu gravuriĝis en ĉies konscienco. Dum la

solena malfermo oni legis la liston de landoj. Longa vico da nomoj – ĝis venis al “Ukrainio”. Tiam la tuta salono leviĝis. Silenta sekundo, kaj poste longaj, varmoplenaj aplaŭdoj. Gesto tiel simpla kaj tamen tiel profunda, ke ĝi trafis rekte en la bruston. Neniu traduko estis bezonata; ĉiuj komprenis.



La ĉeesto de la diplomatoj de la Ambasadado de Ukrainio en Ĉeĥio – tri reprezentantoj, inter kiuj la unua sekretario – donis al la momento alian pezon, pli vastan perspektivon. Ili ne nur ĉeestis; ilia ĉeesto mem estis subteno, signo, ke kulturo kaj diplomatio povas marŝi kune.

La kongreso en Brno montris ion esencan: Esperanto ne estas polvita relikvo de iam pasinta idealismo. Ĝi estas vivanta organismo, konsisto de voĉoj kaj rakontoj, kiuj kunfluas, moviĝas, kreskas. Kaj en tiu fluo Ukrainio ĉi-jare sonis klare, digne kaj profunde home.

Eŭheno Kovtonjuk

Ukrainian esperantistaron reprezentis Olga Bauer (Skobeeva), Nina Daniljuk, Alla Konoval, Eŭheno Kovtonjuk kaj Niko Voloŝin. Ne eblas en mallonga teksto priskribi ĉiujn fakajn kunvenojn, artajn ekspoziciojn, teatrajn kaj muzikajn vesperojn. Mi rakontos pli la plej grava (por mi) tuttaga evento – La Kleriga Lundo, kiu okazis la 28-an de julio. Ĝi enhavis 17 prelegojn kaj prezentaĵojn pri deversaj temoj: E-servoj – “Kial kaj kiel vaste diskonigi Esperanto-eventojn per Eventa Servo de UEA” (Yves Nevelsteen), E-historio – “Mono de Utopio: La Esperantistaj Alternativaj Valutoj de Hieraŭ, Hodiaŭ kaj Morgaŭ” (Ivan Garcia), E-instruado kaj ekzamenoj – “Informado kaj trejnado pri la KER-ekzamenoj” (Katalin Kováts), “Origamio en pedagogio kaj instruado de Esperanto” (Larysa Osadchuk kaj Alain Delmotte), “Fakul-anguloj” (Katalin Kováts, Sylvain Lelarge), “La plezuro desegni” (Monika Molnar), propagando de E-o – “Merkatika funelo – kio ĝi estas kaj kiel esti bona advokato de Esperanto” (Josef Kalčík).



Parto de la prelegoj estis dediĉitaj al monde konataj personoj – “Du Franciskoj: dissemantoj de la paco kaj bono” (Marija Beloŝević),

konstruaĵoj – “Rekonstruado de Nia Damo de Parizo” (Pierre Grollemund), heredaĵoj – “La monda heredaĵo – Printempa Festo” (Yu Jianchao (Terana aŭ ludoj – “Ekkonu aŭ rekonu GOon – unu el la plej tradiciaj kaj internaciaj intelektaj tabulludoj” (Mori Hitosi).

Du prelegoj rilatis al medicinaj kaj psikologiaj problemoj – “Demenco kaj bilingvismo” (Marta Ruzza), “Vi devas ŝanĝi vian vivon – preskaŭ forgesata imperativo de la Homaro” (Georg Hennemann).

En kelkaj prelegoj temis pri konataj verkoj, liaj herooj aŭ gravaj idealoj – “La mondo en 2082 laŭ Sándor Szathmári” (Éva Tófalvy), “Petr Ginz (1928, Prago – 1944, Aŭŝvico)” (Petr Chrdle). Mi kaj Eŭheno Kovtonjuk (vd foton) prezentis la prelegon “Valoraĵoj senlime uzeblaj (La vivo kaj verkoj de Vasil Eroŝenko kiel ekzemplo de universalaj valoroj kaj interkultura dialogo: al la 135-a datreveno de la naskiĝo)”. Ni parolis pri la



humanismaj imagoj de la aŭtoro, kredo je universalaj homaj valoroj: libero, digno, paco, altaj moralaj rilatoj k.t.p. Per dokumentoj, fotoĵoj, bildoj, libroj kaj fragmentoj el la tekstoj ni volis montri, ke Vasil Eroŝenko lasis por ni “valoraĵojn senlime uzeblajn”.

Nina Daniljuk

Ternopilo'1995

En 1995, okcidentukraina urbo Ternopilo fariĝis por la tuta jaro E-ĉefurbo de Ukrainio: tie sukcese funkcias loka E-klubo “Spinofloro” (prez. Nikolao Kriveckij), en la centra parto, inter la provinca prokurorejo kaj Grek-katolika Katedralo estis sidejo de la UkrEA (prez. Viktoro Pajuk), grandformata gazeto de la provinca verkista organizaĵo “Rusalka Dnistrova” aperigadis ukrainaj tradukoj el la originala E-literaturo. Pri E-



movado sciis en la provinca biblioteko, muzeo, arkivejo, en ĉiuj 4 altlernejoj. Tio ĉi kreis bazon kaj eblecon aranĝi en la Ternopila medicina instituto la 10-an Internacian Medicinan E-konferencon (10-a IMEK). Estris Lokan organizan komitaton d-ro Igoro Galajĉuk, tiama docento de la Onkologia katedro de Ternopila Medicina Instituto.

Partoprenis 10-an IMEKon kelkdekoj da medicinistoj el Ukrainio, Ameriko, Eŭropo kaj Azio: d-ro Wlodzimierz Opoka (Pollando), d-ro Nikolao Ŝigajev (Baŝkirio), Katarina Farago (Hungario), Golam-reza Azar Houshang (Irano). La scienca programo de la konferenco daŭris du tagojn, la estroj de la sciencaj sekcioj estis: d-ro Jaroslav Zaharia (Ivano-Frankivsk, UA), prof. V. Bihunjak (Ternopil, UA), d-ro N. Ŝigajev (Ufa, Baŝkirio), d-ro W. Opoka (Krakowo, PL) kaj d-ro I. Galajĉuk (Ternopil, UA). Sciencaj resumoj sendis E-istoj-medicinistoj el Japanio (2), Hungario (2), Bulgario, Rumanio, Kanado, Ĉinio, Litovio, Francio, Baŝkirio, Nederlando, same kiel kuracistoj kaj sciencistoj el Ternopilo, Lvivo, Kijivo kaj aliaj urboj. Materialoj de la Konferenco “Sciencaj Resumoj de 10-a IMEK (12.07-15.07.1995)”, estis publikigitaj en la presejo “Lileja” (Ternopilo) per aparta libro.

Tradicie, por partoprenantoj oni preparis riĉan kulturen programon: ekskurso tra la urbo kun vizito de la provinca muzeo (ene – interesa E-ekspozicio), tuttaga vojaĝo al la Poĉaiva



Laŭro (monakejo) kaj urbo Kremjanec, vespermanĝoj kun ukrainaj kaj E-kantoj. La loka porcelana fabriko por konferencanoj faris tre originalan suveniron kumanec' (vd foton) – ujon por akvo, brando aŭ vino.



Okaze de la konferenco estis eldonita ukraina traduko de “Yumeiho Terapio” (prem-kneda terapio) de Masayuki Saionji. S-ro Masajuki estis direktoro de la Instituto de preventa medicino, kiun li kune kun kolegoj fondis en 1987. La Instituto eldonis E-version de la “Yumeiho”, kiu pli frue jam aperis japane kaj ĉine. Dank’ al Esperanto la libro estis tradukita en 26 (!) lingvoj. Je la ukraina traduko tandemo Galajĉuk-Pajuk eklaboris vintre de 1994/95 jaroj kaj libroforme ukraina “Yumeiho” ekvidis mondon antaŭ la Konferenco. La eldonkvanto – 5000

ekzempleroj (!) estis preskaŭ neimagebla por la juna lando sen propra monunuo (hrivnoj aperis nur post unu jaro, en 1996).

Ankoraŭ unu projekto malsukcesis aperi antaŭ la Konferenco pro la konata ukraina burokrateco. Temas pri la memortabulo omaĝe Miĥajlo Jurkiv – aŭtoro de la plej unua E-lernolibro por ukrainoj. Urbestro de Ternopilo permesis munti la tabulon nur fine de somero. Pro tiu ternopilanoj plu ne rapidis. Tabulon faris fama ternopila skulptisto Ivan Sonsjadlo (li ankaŭ aŭtoris monumenton al I. Franko en Ternopilo, koreografo V. Avramenko en Korsuno). Trapasante ĉiujn barilojn kaj superante diversajn obstaklojn la bareliefo – renoma ZE-objekto, estis finfine muntita sur la domo de la Filharmonio (eksa domo de la Urba frataro) dum la Mikaela-tago – 21an de Novembro 1995, en ĉeesto de multaj samideanoj el kelkaj najbaraj E-kluboj.



d-ro Igor Galajĉuk

Krimeo estas nia

Hurij Korniljev: “Mi ne volas esti implikita en la krimoj de Putino”



Nia samideano, membro de iama jalta E-klubo “Tero”, sciencisto loĝis kaj laboris dek jarojn en la aneksita fare de Rusio Krimeo sen rusia pasporto. Dum la plentempeskala invado de Rusio en Ukrainion, li devis transiri tri landojn por renovigi siajn ukrainajn dokumentojn. Sed la RF registaro ne permesis al li reveni en la landon, fortranĉante la vojon hejmen.

La rakonto de Hurij Korniljev temas pri tio, kiel malfacile estas resti civitano de Ukrainio vivante sub rusa kontrolo, precipe dum milito.

La 44-jara Hurij estas filologo pri la ukraina lingvo kaj kandidato pri biologiaj sciencoj. La bioĥemiisto naskiĝis en Moskvo. Dum la sovetaj jaroj lia familio translokiĝis al Krimeo – pro sanstato necesis favora klimato.

La nomo de Hurij fariĝis konata al la ĝenerala publiko en 2017. Tiam li unuafoje renkontis la FSB-n. Oni pridemandis lin pro tio, ke la rifuzo akiri rusan pasporton kaj loĝado ekde 2014 en la duoninsulo surbaze de loĝpermesilo.

Malgraŭ la promesoj de la rusa registaro, ke la loĝantoj de Krimeo “nenion perdos” pro la aneksado en 2014, s-ro Korniljev baldaŭ perdis sian laboron. Oni maldungis lin de la Nikita Botanika Ĝardeno (NBĜ), kie li laboris kiel scienculo. En la sekvaj jaroj la krimeano travivis ankoraŭ multajn provojn ligitajn al lia statuso de “fremda civitano” en sia hejmlando.

Post kiam Rusio komencis plentempeskan invadon en Ukrainion, Hurij forlasis Krimeon por renovigi siajn ukrainajn dokumentojn. Sed li ne povis reveni hejmen, restinte kun unu valizo en fremda lando.

Hurij rakontas, ke li jam en 2014 komprenis, ke li ne povos adaptiĝi al la rusaj realaĵoj. Li restis en Krimeo nur pro sia maljuna patrino. Li esperis, ke la internacia komunumo baldaŭ devigos Rusion forlasi Krimeon. Sed tio ĝis nun ne okazis.

En aprilo 2024 Hurij Korniljev veturis al Kartvelio por renovigi tie siajn ukrainajn dokumentojn en la ukraina ambasadejo.

“Mi ne volis akcepti rusan pasporton, ĉar mi ne povis akcepti, ke iu

lando en la 21-a jarcento en Eŭropo povas invadi la teritorion de alia lando kaj ŝanĝi ĝiajn landlimojn. Ankaŭ min tuŝis tio, ke Putin referencis al la protekto de ruslingvanoj kaj rusaj civitanoj. Mi naskiĝis en Moskvo, kie tiam loĝis miaj gepatroj. Tio, cetere, ĉiam tre mirigis la agentojn de FSB. Kaj mi ne volas, ke Putin en sia politiko referencu al la protekto de ruslingvanoj. Tial mi decidis ne esti implikita en la krimo de Putin kaj ne akcepti rusan civitanecon”, – tiel klarigis la sciencisto sian decidon vivi en Krimeo sen rusa civitaneco.

La sciencisto asertas, ke en la rusaj realaĵoj la vivo de multaj krimeanoj radikale ŝanĝiĝis.

“Ni ĉiuj en Krimeo alfrontis sankciojn. Multaj kutimaj aferoj subite fariĝis neatingeblaj por ni. Ekzemple, interretaj montraspagoj, liverado de varoj, al kiuj ni kutimis. Multaj longe pensis, ke la okupado de Krimeo estas provizora fenomeno. Sed ju pli longe ĝi daŭris, des pli la situacio malboniĝis. Ĉiam estis sento de premo. Oni devis konstante kontroli siajn vortojn, pensojn kaj emociojn. Eĉ la kombino de koloroj en vestaĵoj povis veki demandojn”, – li rakontas.

Laŭ Korniljev, krimeanoj, kiuj akceptis rusajn pasportojn, estas konstante sub minaco de krima persekuto. Kaj tiuj, kiuj – kiel li – ne akiris rusan civitanecon, vivas sub la minaco de nuligo de loĝpermesilo kaj deportado el sia denaska tero.

La vivo de la sciencisto ekde 2014 ankaŭ draste ŝanĝiĝis. Civitanoj, kiuj loĝas en Rusio surbaze de loĝpermesilo, estas limigitaj en siaj rajtoj. Laŭ la leĝo, ili ne povas partopreni en elektoj, esti elektitaj, labori en ŝtataj instancoj, en sekurecaj strukturoj aŭ havi aliron al ŝtatsekretoj. Sed laŭ Hurij, en praktiko ekzistas ankaŭ aliaj limigoj.

“Kiel oni diris al mi en la NBĜ, ĉar mi mem rifuzis rusan civitanecon, mi ne havas lokon en la rusa scienco. Kiam oni unuafoje vokis min al la FSB pro tio, oni demandis min, kial mi bezonas komputilon kaj interreton en la laboro, kaj ĉu mi havis eblecon transdoni iujn datumojn al Ukrainio. Mi sentis, ke la rajtoj, kiujn la rusaj leĝoj garantias al eksterlandaj civitanoj, estas akompanataj de 'insistaj rekomendoj' de la rusaj sekretaj servoj, kiuj ne estas publike deklaritaj, sed povas esti selektive aplikataj al ĉiu individua persono”, – li diras.

Laŭ li, reprezentantoj de la FSB de Rusio komence interesiĝis pri ĉiu dungito de la NBĜ kaj pri ilia sinteno rilate al la rusa aneksado de Krimeo



Nikita Botanika Ĝardeno

en 2014, post kio kelkaj homoj estis maldungitaj. Inter ili estis ankaŭ tiuj, kiuj ne akceptis la rusan pasporton, aldonis la sciencisto.

Post la maldungo de Hurij Korniljev de la NBĜ, la sciencisto ne sukcesis daŭrigi sian sciencan karieron. Li eĉ estis preta labori en superbazaro.

“Mi ne sukcesis trovi laboron en iu ajn scienca institucio. Oni akceptis miajn dokumentojn por konkurso, sed poste oni anoncis, ke mi ricevis la duan lokon, oni promesis telefoni, sed neniam telefonis. Mi ne povis eĉ trovi laboron en lernejo. Ĉar eksterlandanoj en Rusio ne rajtas labori eĉ kiel ĉiĉeronoj, des malpli instrui aŭ labori kun junularo.

Mi interesiĝis pri laborlokoj en komercaj centroj de Jalto. Sed kiam oni eksciis, ke mi ne estas ne nur eksterlandano, sed fremdulo kun ukraina pasporto, oni rifuzis dungi min, klarigante, ke la organizoj timas grandajn monpunojn. Ŝajne ekzistas tre komplika raportado pri eksterlandanoj, se ilia lando ne estas membro de la Eŭrazia Unio. Tio signifas, ke homoj el Uzbekio, Taĝikio kaj aliaj landoj povas labori en Jalto eĉ sen kono de la lingvo, sed ukrainoj ne povas”, – rakontas la loĝanto de Jalto.

Post longa periodo sen laboro, Hurij sukcesis dungiĝi kiel ĥemiisto-laboranto ĉe la Jalta viandoprilabora fabriko. Sed dum la limigoj pro la

kovida pandemio, tiu entrepreno ĉesis funkcii, kaj li denove fariĝis senlabora.

Denove trovi laboron la krimeano sukcesis en 2021 – kiel ĉefinĝeniero en la Scienca-esplora instituto pri vinberkulturo kaj vinproduktado “Magaraĉ” de la Rusia Akademio de Sciencoj (antaŭ la rusa aneksado de la duoninsulo en 2014 ĝi apartenis al la Nacia Akademio de Agraraj Sciencoj de Ukrainio).

S-ro Korniljev ne sukcesis fariĝi scienca kunlaboranto en la institucio pro la samaj malfacilaĵoj kun raportado. Tamen li sukcesis publikigi siajn artikolojn en rusaj sciencaj revuoj. Baldaŭ li perdis ankaŭ tiun laboron.

“En 2024 la estraro vokis min por konversacion. Oni postulis, ke mi skribu peton pri memvola maldungo. Kaj kiam mi tion faris, oni parolis kun mi malkaŝe. Oni diris: “Oni ja avertis vin – ne elstaru! La FSB postkuras vin. Oni skribis al ni multfoje, ke ni dungis banderanon. Kaj mi devis klarigi, ke vi laboras nur kiel inĝeniero, sed pro viaj sciencaj artikoloj mi havas amason da problemoj”, – asertas la krimeano.

Por daŭre eviti rusan civitanecon, la loĝanto de Jalto dum la milito forlasis Krimeon por renovigi siajn ukrainajn dokumentojn. Por atingi la plej proksiman ambasadejon de Ukrainio, li devis trapasi tri landojn. La vojo de H. Korniljev kondukis lin per trajno de la aneksita Simferopolo al Adler (Rusio), poste per aviadilo al Tbiliso (Kartvelio). Li provis reveni al Krimeo per trajno de Tbiliso al Erevano (Armenio), kaj poste per aviadilo al la rusa flughaveno “Ŝeremetjevo”. Sed dum la filtrado, la rusa registaro rifuzis enlasi lin en la landon.

“Reprezentantoj de la FSB superŝutis min per demandoj, kial mi ankoraŭ ne akceptis rusan civitanecon kaj daŭre vivas kun loĝpermesilo. Kiam mi alflugis al Ŝeremetjevo, oni ne permesis al mi kaj aliaj ukrainaj civitanoj eniri la kutiman dogankontrolon. Oni tuj donis al ni demandaron kun 35 demandoj. Krom ĝeneralaj demandoj, ĝi enhavis punktojn pri kontaktoj kun ukrainaj sekretaj servoj, partopreno en militaj agoj, politika aktiveco, ŝtataj premioj de Ukrainio, informoj pri agado de radikalaj ukrainaj naciismaj organizoj kaj minaco al la sekureco de Rusio”, – asertas Hurij.

Laŭ la krimeano, rusaj sekretaj servoj donas apartan atenton al du demandoj en la formularo: “Ĉu vi subtenas la plenumadon de la “SVO” fare de Rusio en Ukrainio?” (tiel la rusa registaro nomas la militon en

Ukrainion ekde la 24-a de februaro 2022) kaj “Ĉu vi subtenas la politikon de la ukraina gvidantaro?”.

“Mi volis eviti respondi al tiuj demandoj, sed oni diris al mi, ke mi devas respondi “jes” aŭ “ne”, alie oni tuj revenigos min al la loko, de kie mi venis. Mi ne povis diri, ke mi subtenas la SVO, do mi diris, ke mi neniel subtenas ĝin. Pri la dua demando mi respondis, ke mi ne komprenas, pri kiu politiko temas: interna, ekstera, fiskala, socia? Mi ne povas diri tion ĝenerale, ĉar mi ne loĝis dum multaj jaroj en teritorio sub ukraina kontrolo. Sed oni diris al mi, ke mi devas respondi nur “jes” aŭ “ne”.


Mi respondis, ke mi subtenas la politikon de la ukraina gvidantaro, ĉar mi subtenas la servizan reĝimon kun la Eŭropa Unio, la ŝanĝeblecon de la potenco kaj ĝian publikan kritikon, ktp. Poste oni diris al mi, ke temas pri la milita politiko de Ukrainio. Poste oni prenis miajn fingrospurojn kaj manplatojn, kontrolis miajn aĵojn kaj telefonon.

Fine oni demandis min, kies estas Krimeo. Mi respondis, ke laŭ internacia juro Krimeo estas teritorio de Ukrainio. Oni demandis, kial mi ne rezignis pri la ukraina civitaneco. Mi respondis, ke por tio ekzistas proceduro kaj devas esti motivoj, sed mi ne havas tiajn motivojn. Oni diris al mi: “Ĉio pri vi estas klara”, kaj ke mi ne plu eniros en Rusion”, – rakontas la jaltano.

La rusa registaro rifuzis enlasi lin en Rusion, eĉ ne doninte al li iun ajn dokumenton. Li havis sian trajnbileton, per kiu li planis veni al Simferopolo. Sed li ne povis ĝin uzi.

Laŭ Hurij, tiutage rusaj sekretaj servoj ne enlasis en Rusion ĉirkaŭ 50 ukrainajn civitanojn. Inter ili estis loĝantoj de apudfrontaj regionoj de Ukrainio, kiuj post la komenco de bataloj evakuiĝis al eŭropaj landoj kaj poste provis reveni hejmen tra la teritorio de Rusio.

S-ro Korniljev esperis reveni al Krimeo semajnon post sia foriro. Sed fine li restis kun unu valizo en fremda lando. Danke al helpo de amikoj, li sukcesis reveni al Tbiliso kaj poste eniri Ukrainion tra la transirejo



“Palanka-Majaki-Udobne” ĉe la ukraina-moldova landlimo. Lia daŭra vojo al Kijivo estis tra Odeso, kie li estis survoje gastigita de Viktor Vilĥa (vd la foton), esperantisto de Odeso kaj Lvivo. Dank' al tiu halto inter la buso el Kiŝineŭ kaj la trajno al Kijivo okazis mia konatiĝo kun li, dum kiu mi

unuafoje aŭdis la tutan historion.

Sian decidon veni al Ukrainio, malgraŭ la milito, Hurij Korniljev klarigis tiel: “Mi laciĝis esti eksterlandano. Oni forviŝis dek jarojn de mia vivo en Krimeo. Kaj mi ne volis denove travivi tion ie en Kartvelio aŭ Moldavio. Mi parolis kun viroj, kiuj restis tie. Ili diras, ke ili sentas nekomprenon flanke de la lokanoj, ke ili estas tie, kaj ne en Ukrainio, kie oni bezonas ilin. Kaj mi decidis, ke al mi aperis la ŝanco fine realigi tion, kion mi tiel forte deziris – esti kun Ukrainio”.


Eĉ post la restado en neokupita fare de Rusio parto de Ukrainio dum pli ol unu jaro, Hurij ne pretas rekomendi al krimeanoj forlasi Krimeon aŭ resti sur la duoninsulo. Sed li konsilas kredi je si mem, ne rezigni kaj esperi je pli bona estonteco.

Nun s-ro Hurij Korniljev servas je Ukraina armeo kiel medicinisto. Sed pri tio – post la Venko.

Intervjuis Ihor Glagolevskij

Nia historio

Vasil la Brodita – ĉu reĝo de Ukrainio?



La 18-an de aŭgusto 1948, Vasil Viŝivanij (1895-1948) – aŭstra arkiduko kun Ukrainio en sia koro – mortis en la prizonhospitalo Lukjanivka en Kijivo pro torturo kaj plimalboniĝo de ftizo.

Aŭstra arkiduko Wilhelm Franz von Habsburg-Lothringen – milita kaj politika figuro, diplomato, poeto, kiu falis en la historion kiel Vasil Viŝivanij, kolonelo de la Legio de Ukrainaj Siĉ-pafistoj, batalanto por sendependa Ukrainio.

La vivojo de aŭstra aristokrato en viŝivanko (ukr. brodita ĉemizo), kiu sentis sin kiel ukraino kaj konscie defendis la interesojn de Ukrainio, meritas pli ol unu filmadapton kaj priskribon en aventuraj kaj historiaj romanoj.

Dekomence, nenio ligis la posteulon de la reganta domo de la aŭstria-hungara Habsburga dinastio kun Ukrainio. Li naskiĝis la 10-an de februaro 1895 en la urbo Pula (moderna Kroatio). Lia patro Karlo-Stefano komandis la aŭstrian-hungaran militŝiparon en la Adriatika Maro, lia avo

Francisko Jozefo la 1-a kaj lia kuzo Karlo la 1-a estis imperiestroj de la Aŭstria-Hungara Imperio, kaj alia kuzo Alfonso estis reĝo de Hispanio. Tamen, la konatiĝo de Vilhelmo de Habsburg kun Ukrainio, kiu komenciĝis en sia adoleskeco, kiam lia familio translokiĝis al sia bieno en la urbo Żywiec en okcidenta Galicio, daŭris per konscia studado de ĝia kulturo, historio kaj lingvo. Laŭ materialoj de la sovetiaj spionservoj, en 1912, imperiestro Francisko Jozefo mem sugestis al sia 17-jaraĝa nepo, post diplomiĝo de la milita akademio, “trakti la ukrainan aferon” (Aŭstrio-Hungario planis establi kontrolon super ukrainaj teroj ene de Pollando).

Ene de jaro kaj duono, kiam la junulo diplomiĝis ĉe la Militista Akademio Wiener-Neustadt, li legis la originalajn verkojn de M. Hruŝevskij, I. Franko, V. Stefanik. Kaj kiam li estris la 13-an Kavaleriregimenton, kies plimulto estis ukrainoj, li permesis al ili porti flav-blujn insignojn kaj mem surmetis broditan ĉemizon, ricevante sian kromnomon – Vasil Viŝivanij. Ukrainaj soldatoj traktis lin kun granda respekto, rimarkis lian subtenon al la Ukraina Siĉ-pafista Legio, kiun li prenis sub sian patronecon. “Ĉiu, kiu konas lin, konsideras lin estonta hetmano aŭ reĝo”, – atestis unu el ili.

En 1918, armegrupo de aŭstraj trupoj sub la komando de Vasil Viŝivanij, kiu inkluzivis la Ukrainan Siĉ-pafistan Legion, estis redeployita al Ukrainio por subteni la Centran Rada-on. Ĝi partoprenis en la bataloj kontraŭ la bolŝevistoj por Ĥersono kaj Zaporijĥo, kaj poste translokiĝis al Okcidenta Ukrainio. Ekde 1919, Vasil Viŝivanij estis kolonelo en la UPR-Armeo, dungito de la Departemento pri Eksterlandaj Rilatoj de la Milita Ministerio de UPR (Ukraina Popola Respubliko).

Post la malvenko de la Ukraina Revolucio, Vasil Viŝivanij revenis al Eŭropo. Sed li ne perfidis siajn idealojn, sian amon por Ukrainio kaj respekton por ĝiaj kuraĝaj gefiloj, kaj daŭre subtenis la ukrainan nacian movadon. En 1921, en Vieno, li publikigis sian propran poemaron “Tagoj Pasas” en la ukraina lingvo, dediĉante ĝin al siaj ĵurfratoj – la siĉa-pafistoj. Interalie, estas linioj dediĉitaj al ilia memoro, en kiuj la aŭtoro alvokas ukrainojn daŭrigi la lukton por sia libereco: “Al la armiloj!”.

Василь Вишиваний.

Минають дні...



Відень 1921.

© Друкарні Міністерства у справах, VII.

Vasil Višivanij atentigis eŭropanojn pri la situacio de la ukraina popolo, informis pri la Holodomoro de 1932-1933. Dum la Dua Mondmilito, kiam ekzistis espero restarigi sendependan ukrainan ŝtaton, li kontribuis al la establado de kunlaboro inter la OUN kaj eŭropaj specialaj servoj, kaj mem kunlaboris kun la Franca Rezisto kaj britaj specialaj servoj.

Fine de la somero de 1947, Vasil Višivanij estis kidnapita kaj arestita de sovetaj spionoj. Li povus esti fuĝinta el Vieno por eviti malliberigon fare de sovetiaj agentoj, kiel aliaj faris. Sed li ne eskapis. Eĉ dum pridemandadoj en la torturĉambroj de la malliberejo Lukjanivka, li intence respondis la demandojn de la ruslingva enketisto en la ukraina lingvo, kaj per tio li jam defiis la sovetian reĝimon. Rezulte de la “enketo” en aprilo 1948, Vasil Višivanij estis kondamnita al 25 jaroj da malliberejo pro “spiona agado. Tamen, pro torturo kaj plimalboniĝo de tuberkulozo, li mortis la 18-an de aŭgusto 1948 en la prizonhospitalo.

Li estas entombigita ĉe la tombejo Lukjanivka en Kijivo. La preciza tomboloko ankoraŭ ne estas establita, sed Ukrainio malrapide memoras Arkidukon Vilhelmo de Habsburg – Vasil Višivanij kaj honoras lian memoron per stratnomoj kaj esploroj fare de historiistoj. Lastatempe, monumento estis starigita al li ĉe Lukjanivka en Kijivo. Tamen, lia figuro kaj rango ankoraŭ atendas zorgeman esploradon kaj indan honoron, por ke Ukrainio kaj la mondo konu la historion de aŭstro de imperia gento kaj ukraino laŭ vivokupo kaj konscia elekto.

Vasil Višivanij


Al la armilar’!

(Dediĉita al la Ukrainaj Siĉpafistoj)

Pafistoj, al la armilar’!
Disrompu l’ katenojn malmolajn!
Aliĝos al vi forpasinta fratar’,
Saniĝos la vundoj popolaj...

Pafistoj, al la armilar’!
Pluvivu en kor’ kamaradoj,
Songantaj liberon en frida tombar’!
Kuniĝu por la batalado!





Pafistoj, al la armilar'!
Kaj Ukrainio ribelos,
Viviĝos en sanga baptuj' mortintar',
Kaj ĝojo enlande ekhelos.

Pafistoj, al la armilar'!
Leviĝu por sav' de l' patrio!
Kaj la kozakidoj tra la triumfark'
Revenu al la familio!

Originala poezio

*“Via teksto povas iĝi bela kanto,
se vi partoprenos kiel konkursanto!”*

Per tiu ĉi frazo UEA invitis verkemulojn al BK in branĉo “kantoteksto”. Konstanta aŭtoro de la “Ukraina Stelo” Petro Palivoda ne nur atente legis alvokon, sad ankaŭ partoprenis la konkurson kaj gajnis 1-an kaj 2-an premiojn. Gratulojn, s-no Petro! Jen la teksto de la kanto-venkinto:

Petro Palivoda

Ploras la ĉiel'

Ekde la maten' frapadas pluv'
Kvazaŭ tamburado sur tegmento.
Ŝajnas, ke minacas nin diluv'
El sub alta griza firmamento.
Larmoj falas al la trista ter',
Homoj hastas hejmen en silento
Tra malvarmo, koto, malesper',
Forkurante de l' pluveg' kaj vento.

Refreno:

Supertere ploras la ĉiel',
Vane mi por la renkonto preĝas
Malaperis vi en la malhel',
Ĉion la severa pluv' sieĝas.

Forlavitas ĉiu via spur'
Per la nuboj ŝtormaj kaj koleraj,



Restis trans la densa pluva mur'
 Viaj kisoj, dolĉaj kaj teneraj.
 Frapojn ĉe l' fenestro aŭdos mi
 Tuj malfermos larĝe mi la pordon.
 Vi silentas, tamen ventokri'
 En ĉi-nokt' donacu salutvorton.

Refreno:

Supertere ploras la ĉiel',
 Vane mi por la renkonto preĝas
 Malaperis vi en la malhel',
 Ĉion la severa pluv' sieĝas.

Jubileoj



Vsesvit – 100

100

Ĉi jare “Vsesvit”, la plej malnova ukraina revuo pri fremda literaturo, festas sian 100-jaran jubileon. La fondo okazis en januaro 1925 en Ĥarkivo fare de la fondinto Vasil Ellan-Blakitnij, kvankam la ideo fondi revuon pri “fremda literaturo” en la ukraina lingvo datiĝas de 1919, dum la tempo de Ukraina Popola Respubliko, tamen, pro politikaj kialoj ĝi ne estis efektivigita. Rekte partoprenis en la kreado de la revuo ankaŭ literatura redaktoro Mikola Ĥvilovij, artredaktisto Oleksandr Dovĵenko. Abono al “Vsesvit” estis efektivigita per registara financado je la kosto de “Visti”. Famaj aŭtoroj kaj fotistoj el la Ukraina SSR kaj la mondo partoprenis en la revuo. La publikaĵoj estis ilustritaj, tradukitaj eksterlandaj novaĵoj, artikoloj pri loka historio kaj kulturaj kaj edukaj agadoj de la periodo de “ukrainigo”. La literaturan direkton reprezentis poezio kaj prozo de tiaj aŭtoroj kiel Henri Barbous, Johano Dos Passos, Ivan Bahrjanij, Ostap Viŝnij kaj aliaj.

Vasil Ellan-Blakitnij redaktis la revuon nur dum unu jaro: grava kormalsano, kiun li havis ekde frua infanaĝo, kaŭzis lian morton en la aĝo de 32 jaroj. La 4-an de decembro 1925, Vasil mortis en Ĥarkivo (tiam la ĉefurbo de la Ukraina

SSR). La 5-an de decembro 1925, pro lia senlaca laboro por la bono de la laboristaj kaj kamparanaj masoj, li ricevis la Ordenon de la Ruĝa Standardo de Laboro de la Ukraina SSR (postmorte). Poste, la sovetaj aŭtoritatoj markis la poeton kiel “burĝan naciiston” kaj “banditon”; li eĉ estis postmorte (!) kondamnita al la mortopuno. En 1934, la tomboŝtono starigita de liaj amikoj sur lia tombo en Ĥarkivo, estis malmuntita. La verkoj de la verkisto estis oficiale malpermesitaj, kaj liaj Borotbistoj-kamaradoj estis pafitaj aŭ ekzilitaj al Siberio. Post la XX-a Kongreso de la KPSU, Vasil Ellan-Blakitnij estis rehabilitita.

Vasil Ellan (Blakitnij)

ANTAŬEN!

Forgesu ripozon! Forgesu laciĝon!
Tutfortu la marŝo envigla potenc'!..
Ĉirkaŭas nin nokto kaj plena obskuro,
Sed brilas eklumoj – al taga komenc'.
Amikoj tre karaj! Plenviglu ekstare,
Malfortajn kunligu al nia kohort'.
Ĉu iu obstaklos la vojon okaze?
Ni flamas en koroj, en plena akord'.
Delonge ni iras laŭvojo de gloro,
Ni kuglojn ne timas en streĉa aktiv'.
Forgesu ripozon dum fortas fervoro!
Eĉ morte ne prenos ŝlosilon de viv'.

Tradukis Sergeo Rublov

En 1925-1934, la revuo aperis dufoje monate, sed oktobro 1934, pro politikaj cirkonstancoj, ĝi estis fermita, kaj la plej multaj dungitoj estis subpremitaj kaj mortigitaj.

Nova “Vsesvit” estis refondita en 1958 en Kijivo kun la helpo de la Departemento de Scienco kaj Kulturo de la CK de la Komunista Partio de Ukrainio. “Universala Ilustrita Revuo” estis transformita al traduka revuo. La periodaĵo fokusiĝis al literaturo kaj tradukoj ĝenerale. Aparte, ĝia apero en 1958 estas ligita al la iniciato de la Verkista Unio kaj persone de Maksim Rylskij. La revuo estas dediĉita al fremda literaturo, kulturo, arto kaj socipolitikaj akcentoj de fremdaj landoj kaj iliaj ligoj kun Ukrainio. Ĝis 2020, la revuo publikigis pli ol kvindek romanojn, milojn da poemaroj, noveloj kaj dramaj

verkoj, milojn da artikoloj, esploroj, eseoj, raportoj kaj intervjuoj kun aŭtoroj el 105 landoj de la mondo en tradukoj el 84 lingvoj.

Foje sur la paĝoj de la revuo aperis tradukoj el IL: Nadija Hordijenko-Andrianova ukrainigis verkojn de S. Szathmari (1967), T. Sekelj (1986), poste V. Pajuk konatigis legantojn kun rakontoj de V. Eroŝenko (2000), J. Leser (2002). Tre interesa kolekto el Esperanta originala literature estis publikigita en duobla numero 3-4 (2007): 8 poemoj de B. Auld, rakontoj de J. Baghy, C. Conterno-Guglieminetti, P. S. Viana.

Estimataj kolegoj-vsesvitanoj, sukcesojn al vi, el akvo kaj roso!


Redakcio de "US"

La vojaĝo de la jaro: sen Eroŝenko – pri Eroŝenko

Foje la historio redonas al ni tiujn, kiujn ni iam preterpasis. Homojn tro liberajn por sia epoko, tro malkomfortajn en sia vero, tro klarajn en sia interna libero, kiu antaŭigas sian tempon. Por mi tia malkovro antaŭ pli ol dudek jaroj fariĝis Vasil Eroŝenko – blinda vojaĝanto kaj verkisto, filozofo, lingvisto, esperantisto; homo, kies vivo kaj penso ampleksis duonon de la mondo, lasante profundan spuron tie, kien aliaj nur revis iri.

En 2007 el ĉi tiu persona renkonto naskiĝis la fonduso "Espero". Ĝia misio estis duobla kaj ekvilibra, kvazaŭ sur vekto: revenigi Eroŝenkon en la kulturan konscion de Ukrainio kaj samtempe fortigi la ĉeeston de Esperanto pere de lia heredaĵo. Unu flanko subtenis la alian: ni eldonadis liajn verkojn, tradukojn, esplorojn kaj, krome, vastan esperantan literaturon.

Sed la vojo de Vasil ne estas nur libroj. Ĝi estas homoj, renkontoj, rigardoj, vivaj konversacioj. Tial ĉi tiu jaro, plena je vojaĝoj kaj prelegoj pri li, fariĝis aparte elokventa kaj varmoplenigita.



Mallonge pri Vasil Eroŝenko

Vasil Eroŝenko naskiĝis en 1890 en la vilaĝo Obuĥivka en Sloboĵanŝĉino. Infana malsano forprenis lian vidon, sed ne lian soifon al la mondo. En la Moskva lernejo por blinduloj li eklernis la Brajlan skribon, muzikon, plurajn lingvojn – kaj tie li unufoje tuŝis Esperanton, kiu poste fariĝos unu el la ĉefaj iloj de lia vivo.

En 1912 li memstare ekvojaĝis al Londono, al la Reĝa Lernejo por Blinduloj, kaj de tie – al Japanujo, Ĉinujo, Barato. Tie li instruis, verkis, prelegis, laboris kun homoj, kiuj bezonis subtenon kaj edukadon. Lia vojo estas ĉeno de rakontoj, kulturaj kruciĝoj, internaj kaj eksteraj malkovroj. Reveninte hejmen, li fermis sian teran vivon en 1952 en sia denaska vilaĝo.

La paradokso de handikapo.

La vivo de Eroŝenko detruas la kutiman ideon pri handikapo kiel limo. Por li blindeco ne estis manko, sed alia maniero vidi. Li akiris siajn aŭdon, tuŝon, lingvan senton, subtilan percepton de la ritmoj kaj tonoj de la mondo. La plej malfacilaj baroj estis ne fizikaj, sed sociaj. Eroŝenko instruis blindulojn en diversaj landoj, defendis respekton anstataŭ kompatato. Lia pedagogia metodo antaŭvidis la principojn de inkluziva edukado longe antaŭ ol ili fariĝis normo. Li postulis ne prizorgon, sed egalecon.

Eroŝenko regis pli ol dek lingvojn kaj verkis en la japana, ukraina, rusa kaj Esperanto. Li ne nur parolis en ili – li pensis per ili. Ĉiu lingvo donis al li apartan mondon, apartan vojon de pensado. Esperanto fariĝis por li lingvo de egaleco, neŭtrala spaco, kie homoj povis renkontiĝi sen limoj.

Tial la vivo kaj agado de Vasil instigis min fari vojaĝon “sen Eroŝenko, sed pri Eroŝenko”.

Mezorianta Esperanto-Seminario, Francio, 15–23a de marto. La prelego kolektis plenan salonon – ne danke al la preleganto, sed danke al la figuro de Eroŝenko, lia klareco, luma humanismo kaj kuraĝo rigardi la mondon sen landlimoj. Estis multaj demandoj, mirigoj kaj novaj malkovroj por la ĉeestantoj.



Esperanto-Kongreso en Sorio, Hispanio, 1-5an de majo. En malnova kastilia kastelo la projekciita portreto de Eroŝenko sur la scenejo aspektis kvazaŭ antikva mozaiko. Dum la prelego la mikrofono falis – kaj la momento, kiam mi kliniĝis por daŭrigi, kreis varman, preskaŭ hejman rideton kaj neatenditan proksimecon en la salono. La intereso estis tiel granda, ke la loka kultura asocio tuj invitis min ripeti la prelegon –

ĉi-foje kun hispana traduko.

Baltiaj Esperanto-Tagoj, Kaŭno, Litovujo, 05-13 de julio. BET, fondita dum sovetaj tempoj kiel alternativo al UK, ĉijare kolektis pli ol 250 partoprenantojn. La kongreson malfermis la unua vicprezidanto de la Litova parlamento, membro de la Eŭropa Parlamento, kaj la organizado estis, kiel ĉiam, senripoĉa – danke al la prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio, Povilas Jegorovas. La prelego pri Eroŝenko vekis apartan interesiĝon: novaj faktoj, sciencaj materialoj, klara strukturo. Por multaj Eroŝenko malfermiĝis unuafoje – kaj tio videblis en iliaj okuloj.

Dulanda Kongreso, Toronto, Kanado, 11-14a de julio – komuna kongreso de Usono kaj Kanado. La prelego pri Eroŝenko denove kaŭzis fortan resonancon. Liaj ideoj pri libero, universalismo, interkompreno sonis kvazaŭ ili estus verkataj por nia epoko. Eroŝenko, kiu vivis antaŭ unu kaj duona jarcento, montriĝis tiel moderna, ke tio eĉ iom konfuzis la aŭskultantojn.



Universala Kongreso de Esperanto, Brno, Ĉeĥujo, 26.07-02.08. Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Brno la prelego estis prezentata kune kun la doktorino, profesorino en Lesja Ukrainka nacia universitato, urbo Luck, Nina Daniljuk, fariĝis transiro de popularigo al plena scienca analizo de la figuro de Eroŝenko.



Lvivo, Ukrainio. Tie kadre de la kongreso de la Ukraina Esperanto-Asocio kaj kun subteno de la urba administracio, en 2018 estis instalita memortabulo dediĉita al Eroŝenko sur la plej longa strato de la urbo. Dum nia vojo de Brno al Kijivo ni haltis kune kun mia malnova amiko, la pakistana esperantisto Parvaz.

La lasta punkto de la itinero estis Kijivo, urbo, kie ankaŭ ekzistas strato renomita honore al Eroŝenko (antaŭe strato de Richard Sorge). Kune kun la ĉefurbaj esperantistoj ni denove honoris la memoron de ĉi tiu rimarkinda, kuraĝa homo.

La fonduso “Espero”, revivigita en 2025,



realigas la projekton “Resaniĝo per Arto”. Ĝia celo estas helpi viktimojn de la milito restarigi internan ekvilibron pere de fototerapio, artterapio kaj kulturaj praktikoj. Tio estas rekta daŭrigo de la ideoj de Eroŝenko: homeco, kulturo, arto kiel rimedoj de resanigo.

Konkludo: vidi pli profunde. Eroŝenko montris: limoj troviĝas ne en la korpo – sed en la konscio. Lia vivo tion konfirmas. Li pruvis, kiel unu sola homo povas konstrui pontojn inter kulturoj kaj homoj, se li posedas sufiĉe da digno, empatio kaj kreiva forto. Kaj ĝuste tio estas tio, kio plej mankas al la mondo hodiaŭ.

*Eŭheno Kovtonjuk,
estro de la fonduso “Espero”*

Esperanto – malesperante



Finante la Jaron de Eroŝenko ankaŭ por rubriko “Esperanto – malesperante” estis elektitaj du ukrainigitajn poemojn de la nevidanta poeto: Homarano kaj Printempo. La unuan siatempe tradukis Nadija Hordijenko-Andrianova kiel HomaraMo (anstataŭ HomaraNo). La duan versaĵon iam trovis kaj aperigis sur la paĝoj de Hungara vivo renoma hungara E-poeto, tradukisto, redaktoro Kolomano Kaloĉajo (Kalman Kalocsay). Ambaŭ poemojn tradukis Petro Timoĉko (1925-2005), elstara ukraina

poeto, tradukisto el la germana, pola, latina, kiu ukrainigis ankaŭ poemojn de L. Zamenhof, E. Privat, B. Auld k.a. Sur la foto – portreto de V. Eroŝenko fare de Nakamure Tsune (oleo, tolo, Nacia Muzeo de Moderna Arto, Tokio).

Людина

Запалив я у серці вогонь,
Щоб у нім він ніколи не згас:
Не поборе його навіть смерть,
Не приборкає силою час.

Він горітиме, поки живу,
Поки в жилах кружлятиме кров,
Його ім'я – любов до людей,
Його ім'я – до волі любов.

Весна

Ти мусиш мріяти і жити
Надією одною,
Весна гряде, втішає душу,
Весна стає явою.

Під теплим сонцем благодатним
Цвітуть червоні квіти,
Щезають сльози, б'ється серце
Його теплом зігрите.

Весняний вітер світ розбудить,
На річці крига скресне,
Сягне свого zenіту сонце
Звितяжне і чудесне.

З есперанто Петро Тимочко

Moderna ukraina prozo

Maria Matios

Maria Matios (n. 1959) estas ukraina verkistino kaj politika figuro. Ŝi havas la neoficialan titolon “la plej produktiva aŭtorino de Ukrainio” kaj estas unu el la cent plej influaj virinoj de la lando. Ŝi naskiĝis en Bukovina



vilaĝo Bukovino en Ĉernivca provinco. En 1982 ŝi diplomiĝis ĉe la Filologia Fakultato de la Universitato de Ĉernivco. Popola deputito de du kunvenoj. Laŭ la rezultoj de sociologia esplorado, Maria Matios (en la foto – kun E-tradukisto) estas senescepte inter la kvin modernaj verkistoj, kiuj estas legataj kaj

konataj en Ukrainio. Ŝi publikigis siajn unuajn poemojn en la aĝo de 15 jaroj kaj debutis kiel prozisto en la revuo “Kijivo” (1992). Ŝi estas aŭtoro de multaj poeziaj, prozaj libroj kaj esearoj, membro de la Nacia Unio de Verkistoj de Ukrainio (ekde 1986). Kritikistoj nomas ŝin aŭ “la diableto, kiu saltis el la flartabakujo”, aŭ la granda damo de la ukraina literaturo.

Romano “Dolĉa Darinjo” estas la plej fama libro de la aŭtorino. Ekde la publikigo (2004), la libro trapasis 6 eldonojn kun totala eldonkvanto de pli ol 200 mil ekzempleroj. La romano estas agnoskita kiel la plej bona libro de la unua 15-a jarperiodo de la Sendependeco, kiu havis la plej grandan efikon je ukrainoj. Tradukita en pli ol 10 lingvojn. Pro ĝi Maria Matios fariĝis laŭreato de la Ŝevĉenka Nacia Premio de Ukrainio (2005).

La libro rakontas pri la amara sorto de Darinjo kaj ŝiaj gepatroj, kiuj estis kripligitaj de sovetiaj ŝtataj sekurecaj fortoj dum la okupado de okcidenta Ukrainio fare de USSR. La eventoj disvolviĝas en la Bukovina montvilaĝo Ĉeremoŝne. La verko estas sufiĉe forta laŭ sia naturo, komenciĝante facile kun malrapide kreskanta streĉiteco, priskribante la malfacilan vivon de virino Darinjo en montvilaĝo dum la soveta epoko, iam en la 1970-aj jaroj. En la vilaĝo ŝi estas konsiderata muta kaj freneza pro siaj oftaj kapdoloroj, sed pro iu kialo oni nomas ŝin Dolĉa Darinjo. Ŝi naskiĝis en marto de 1940 kiel ordinara sana infano, sed, fakte, por bombono, ŝi malkaŝis siajn gepatrojn al la militistoj, kiuj venis serĉi ilin en



la domon. En la aĝo de 10 jaroj, ŝi spertis grandan streson – la morton de la patrino, pro kio ŝi malsanis.

“Per sia romano “Dolĉa Darinjo”, la verkistino Maria Matios kuraĝe kaj decide malakceptis la regulojn de politika singardemo kaj sociaj

tabuoj – kaj je sia propra danĝero kaj risko, ŝi entreprenis kruelan vojaĝon en nian sangon kaj ne malpli kruelan historian inferon, en abismon, kiun timigas rigardi”, – konkludis verkisto Pavlo Zagrebelnij.

Maria Matios

Dolĉa Darinjo

...KAJ MATENE, EN LA DUA tago post la Dmitro-festo, tuta kamiono da soldatoj kun armiloj alvenis al vilaĝo Ĉeremoŝne.

Kaj denove oni pelis la vilaĝon al la sovetejo. Estis malvarme kaj tre vente. Neĝis kaj pluvigis – do homoj vestis sin vintre: per vatitaj peltoj kaj malnovaj sardakoj. La viroj, kiuj ricevis ordonon veni en deviga ordo, estis

apartigataj de la virinoj – kaj nun du nigraj grupoj kunpremiĝis ĉe la malantaŭo de la vilaĝa konsilejo.

Sub la nigra muro, ĝuste sub la granda fenestro, sidis... du mortintoj: junulo kaj junulino, oni povus diri, preskaŭ knabino. La vento movis iliajn harojn sur iliaj kapoj – kaj ŝajnis, ke ili vivas, nur timante malfermi la okulojn pro honto. Tute nudaj, kvazaŭ ĵus naskitaj, ili apogis la vilaĝsovetojn, samtempe apogante unu la aliajn kapojn.

La knabo dekstre kaj la knabino maldekstre havis trapafitajn tempiojn. Kaj se oni ne scius, ke temas pri sango, oni supozus, ke ili metis po unu sekiĝintan rozeton sub siaj haroj.

Segita ĉaspafilo elstaris el inter la kruroj de la knabo, kvazaŭ celita al la ĉielo.

Inter la kruroj de la knabino, larĝe disigitaj, tiel ke granda haŭtmakulo sur la interna flanko de ŝia femuro estis videbla, elstaris pinokonuso, kovrante la ruĝetan pubhararon. Anstataŭ mamoj, du profundaj truoj estis nigrigitaj per hardita sango. Unu el la okuloj de la knabino estis elbatita kaj ankaŭ gapis per terure elŝirita truo.

Sur la peroneto staris Diduŝenko en longa leda mantelo, fumante kaj silente mezurante homojn per siaj okuloj.

Virinoj ploris, kaŝante siajn vizaĝojn en la manikoj de siaj vatpeltoj.

Viroj staris kun siaj kapoj klinitaj al la tero.



Estis kviete – ŝajnis kvazaŭ oni aŭdas la neĝon falantan, larme fluantan sur la mortintojn.

La ulo estis el vilaĝo Ĉeremoŝne. La filo de Jurko Ogronnik. Ivano, alinomita Akcipitro.

Kiam la germana taĉmento ankoraŭ estis en la vilaĝo, la Ivana militgrupo disbatis ilian provizkonvojon. La ribeluloj senarmigis la gardistojn, kuŝigite ĉiujn vizaĝmalsupren sur la teron, kaj alkroĉis... ovojn al iliaj dorsoj, minacante ke ili estas grenadoj. Dum la germanoj kuŝis senmove, la viroj de Ivan bone mastrumis. Kaj se ne okaziss la evakuado, kiu scias kiel la germanoj povus trakti la lokajn homojn.

Kaj de tiam, Ivano estis la mastro de la arbaro dumtage, kaj nokte – en

la proksimaj vilaĝoj de Bukovino kaj Haliĉio. La nova registaro bone sciis pri lia laboro, ĉiutage perdante se ne policanon, do kolĥozestron. La “duaj sovetoj”, kiel la montanoj nun nomis la novan-malnovan registaron, promesis grandan monon al ĉiu, kiu malkaŝus la restadejon de Ivano aŭ liajn eblajn kontaktojn.

En la vilaĝo oni sciis, ke la Ivana militgrupo restis la lasta en la distrikto: ja estis 1950. Sed nek sistemaj atakoj nek ruzaj embuskoj kondukis al iu ajn el la kaŝejoj de Ivano. Bonaj homoj informis al kiu ajn bezonis scii, ke la sola persono en la mondo, kiu sciis pri la vera restadejo de la filo, estis lia patro. Do, oni establis gvatadon sur la domo de Ogronnik kaj sur Jurko mem, kaj fare de tre observemaj lokuloj kaj multnombraj militistoj, sed ankaŭ tio nenion rezultigis: Jurko malaperis el la vilaĝo pro iu nekonata kialo, sed ĉiam revenis hejmen en plena taglumo kun malplenaj sakoj sur la ŝultroj, kvazaŭ li mezuras la vojon post laciga sed sukcesa merkata komercado. Li iris laŭ la strato, tute indiferenta, kvazaŭ malplena, kiel liaj sandaloj, kaj rigardis rekte antaŭen, nek salutante nek respondante al salutoj. Kaj unu tagon la MGB-anoj traserĉis la tutan korton de Ogronnik kaj renversis la domon – sed ili ne trovis sekretan pasejon. Poste ili kondukis la maljunulon al Viĵnica MGB-sidejo. Ogronnik estis en malliberejo dum pluraj monatoj, sed ĝis hodiaŭ la vilaĝo sciis, ke li ne perfidis sian filon. Iu alia certe perfidis lin, se Ivano, nun mortinta, apogis la vilaĝan sovetejon.

La knabino ŝajne ne estis samlokulino, ĉar neniu rekonis ŝin. Kelkaj flustris, ke ŝi estas kontaktulino, kaj ke eble ŝi eĉ montris la bunkron de Ivano. Aliaj kapjesis, silente sugestante ion alian. Sed tiel aŭ alie, preskaŭ la tuta vilaĝo nun estis peze silenta, enspirante aeron en siajn brustojn kaj retenante la spiron pro timo.

Dume, Diduŝenko malsupreniris de la peroneto, grumblante ion nekompreneblan al la armita soldato staranta apud la kadavrojo.

Sen hezito, li kuris al la muro, unue fortiris la knabinon per ambaŭ manoj, metante ŝin vizaĝon supren preskaŭ antaŭ la homoj mem, kaj poste metis la knabon sur ŝin, vizaĝon malsupren. La malantaŭo de la Ivana kapo estis tute dispremita, nur sur ĝia plej alta parto la vento forblovis la restaĵojn de mola blonda hararo – kaj la vido de ĝi ŝajnis starigi la harojn de la homoj, ĉar kelkaj el la viroj konstante glatigis siajn nudajn kapojn per la manplatoj.

– Nu, kio? – demandis Diduŝenko, ĵetante cigaredon al la kadavroj: – Ĉu vi rekonis, kiu putino manĝigis ĉi tiun Banderanon? – li prenis la mentonon de la unua staranta en la vira grupo. – Ĉu vi konas ŝin? Vi ne konas! Kaj mi ne konas. Sed nun mi ne plu zorgas, kiu estas ĉi tiu larvo. Amo al la tombo! – li ridis tra la dentoj kaj kraĉis. – Nun oni alportos alian. Li volis esti pli saĝa ol ĉiuj. Tio ne funkcias! – kriis Diduŝenko, irante tien kaj reen antaŭ la timigitaj homoj. – Jen kio okazos al ĉiu, kiu kuraĝas rezisti aŭ kontraŭdiri la sovetan registaron.

...Dume, ĉaro eniris la korton. La soldatoj eltiris de ĝi la mortintan Jurkon Ogronnik kaj metis lin sub la muron de la vilaĝa sovetejo, en la sama loko de ĵus forprenitaj kadavroj. La mortinta patro, kun la kapo rompita je kolo, rigardis la bildon de la nehoma mokado de la vivantoj pri sia murdita filo – kaj la sensentaj kaj ŝtoniĝintaj homoj rigardis la tri kadavrojn per la rigardo, per kiu rigardas tiuj, kiuj certe scias, ke ankaŭ ili devas esti masakritaj post ĉi tiuj malfeliĉuloj.

La maljuna Ogronnik estis nuda ĝis la talio, kaj liaj brakoj estis detranĉitaj ĉe la kubutoj. La mizera vizaĝo ankaŭ similis al sanga miksaĵo, kaj se ne estus sur lia kapo, inter tondigitaj haroj la granda bulo de haŭtmakulo, homoj eble ne rekonus la maljunulon.

– Mi mem rakontos al vi, kiel tiu ĉi nefinbuĉita apro provis trompi nin! – Diduŝenko kraĉis salivon al la homoj. – Ĉar vi ĉiuokaze mensogos. Kaj mi diros al vi la veron, por ke vi memoru: tio okazos al ĉiu, kiu helpas la banditojn. Tiu ĉi maljuna furzulo obstinis montri la bunkron de sia filo dum tri monatoj. Sed ni estas paciencaj. Neniu estas tiel pacienca kiel la soveta registaro kaj ĝiaj reprezentantoj! – Diduŝenko kriis senspire. – Kaj poste li decidis trompi nin kaj kondukis nin al la Diabla Abismo. Tiu ĉi aŭstra fikulo provis salti en la abismon kune kun nia oficiro, al kiu li estis mankatenita. Tio ne funkciis! Ni helpis lin flugi malsupren sola. Kaj li helpis nin forlasi liajn manojn. Por tio ni havas akrajn bajonetojn.

Ni tiris nian kamaradon je lia militpalto, kune kun la manoj de la maljunulo. Sed ni ankaŭ tiris ĉi tiun bastardon el la fundo, por montri denove, ke tia sorto atendas ĉiun, kiu provas trompi nin eĉ iomete! Ĉiujn!

La soveta registaro aŭdas ĉion, vidas ĉion, kaj scias ĉion, ĉar ĝi havas orelojn kaj okulojn ĉie. Kaj ĝi kaptos ĉiun en iu ajn bunkro. Same kiel oni kaptis ĉi tiujn du fiaĉulojn kaj ilian virinaĉon. Ili volis amon ĝis la tombo – ili havas ĝin. Kaj ili havas atestantojn...

Rigardu ĉi tien kaj diru al ĉiu, kiu havas orelojn sed ankoraŭ ne komprenis: hodiaŭ la lasta bando kaj ĝia estro estis eliminataj en ĉi tiu teritorio. La la-a-sta!

*Tradukis Araneo
Bildoj de Oleg Loburak*

Ukrainia Antologio

Stepan Rudanskij



Stepan Rudanskij (1834-1873) estis kuracisto kaj poeto, kiun ofte nomas “ukraina Rabelezo”. Li naskiĝis en Podolio en la familio de la pastor, lernis en Podolia Seminario en Kamjaneco, sed pro la konflikto kun la patro li translokoĝis en Peterburgo, kie studis en la Medicina akademio. Tie konatiĝis kun ukrainaj verkistoj, kiuj eldonis revuon "Osnova". La unuaj verkoj publikigis en 1859 en Peterburgo. De 1861 laboris kiel kuracisto en Jalto (Krimeo), kie mortis pro ftizo. Enterigita en Masandra tombejo. La unusola ukraina gimnazio en Jalto estis nomita je la nomo de S. Rudanskij.

Verkis lirikajn poemojn, kantojn kaj humur-versojn (ukraine – spivomovka). Libro de S. Rudanskij “Flugu, vent’, Ukrainion” (en lingvoj de la mondo, kompilis fratoj Ĥomenkoj, Kijivo, 2003) enhavas ne nur du E-tradukojn, sed IL servis ankaŭ kiel pontlingvo inter originalo kaj ses aliaj

S. Rudanskij

Hej, bovoj!

Hej, bovoj, ek! Pro kio haltos?
Ĉu per fiherboj plenas lok’?
Ĉu, eble, rusto manĝis koltron,
Aŭ malakriĝis tute sok’?
Hej, bovoj, ek! Trunketoj sekas,
Kaj kardoj falas mem pro sek’,
Kaj soko, koltro estas novaj:
Pro kio haltis bovoj? Ek!



Hej, bovoj, ek! Trunketojn rompu,
Faligu, tretu kun fervor',
Ke malaperu ĉi fiherboj
De sur gepatraj kampoj for!
Per akra koltro, akra soko
Kuraĝe, hej, sen timoblek'
Eltranĉu ilin kun radikoj!
Pro kio haltis, bovoj? Ek!

Hej, bovoj, ek! Ni plugu l'kampon
Kaj semu grenon dum printemp',
Kaj ĝi el ter' pro varma pluvo
Ekĝermos post mallonga temp'.
Kaj kvazaŭ kronoj, niaj kampoj
Verdiĝos post pretempa vek'
Kaj mirigite gapos mondon –
Pro kio haltis, bovoj? Ek!

Hej, bovoj, ek! Maturaj spikoj
Origos kampon en somer'
Kaj per mielo kaj per lakto
Refluos nia sankta ter',
Kaj pasos la malbono ĉia,
Estiĝos de l'feliĉo reg';
Pro kio halt', infanoj miaj?
Jam tempo venis! Bovoĵ, ek!

Tradukis Volodimir Pacjurko

Vasil Barka

Vasil Barka (1908-2003) estis doktoro de filologio, ukraina poeto, prozisto, pensulo. Li naskiĝis en la Poltava regiono. Estis vundita dum la Dua Mondmilito. Post la milito V. Barka (vera nomo – Oĉeret) elmigris en Germanion, kaj poste – en Usonon. Aŭtoro de dekoj da poeziaj kaj prozaj verkoj, profunda filozofo de kristana orientiĝo. “La Flava Princo” (1963) estis la unua artverko, kiu prezentis la Holodomoron kiel genocidon, li estis la



unua, kiu kriis al la tuta mondo: “La Holodomoro ne estas tragedio. Ĝi estas murdo. Ĝi estas genocido”.

Lia romano “La Flava Princo” estas ne nur literaturo. Ĝi estas la ĝemo de la ukraina lando, kiu perdis siajn infanojn. Ĝi estas konfeso nome de milionoj – kaj tiuj, kiuj travivis, kaj tiuj, kiuj malsatis ĝismorte en 1932–1933. La romano estis verkita en ekzilo – en Usono, kie Barka alvenis post la milito. Li havis nek komforton nek rekonon. Sed li havis vorton. Kaj konsciencon. Kaj memoron.

La verko centriĝas ĉirkaŭ la kamparano Mirono Katrannik kaj lia familio. Ni vidas ilian malrapidan vojon al morto – ne ĉar mankis la rikolto, sed ĉar la aŭtoritatuloj intence forprenis la lastan grenon, la lastan ŝelon de la arbo, la lastan spiron. “La Flava Princo” estas bildo de la soveta reĝimo, kiu venas ne kun rikolto, sed kun falĉilo.

Vasil Barka estis unu el la unuaj, kiuj diris tion, kio estis silentita dum jardekoj – la Holodomoro ne estis “sekvo de sekeco”, sed celkonscia armilo de la Kremlo kontraŭ ukrainoj. Kaj ĝuste la romano de Barka estis unue tradukita en la anglan – ĝi malfermis la okulojn de la okcidenta mondo, kiu tiutempe ankoraŭ ne kredis je tia krueleco.

Tiu ĉi verko estis malpermesita en Sovetunio, sed ĝi atingis Ukrainion per samizdato. Homoj transdonis ĝin sekrete kaj flustre. Ili legis ĝin nokte. Kaj ili ploris. Barka diris: “Kiu elvokas la suferon de la popolo, tiu purigas la nacion”. Li ankaŭ kredis, ke vortoj estas armiloj, ke verkisto ne rajtas silenti kiam lia popolo mortas. “Popolo, kiu mortas silente, ne reviviĝos. Sed kiu trovas vortojn, tiu revivigas sin mem”.

Vasil Barka

La flava princo

La kamparanoj, kunvenintaj alarmite ĉe la vilaĝa soveto dimanĉe posttagmeze, aŭskultas la parolanton kiel neniam antaŭe en Klenotoĉo.

Miron Daniloviĉ premis sin kontraŭ la muron, apud la fora fenestro, kaj rigardis la parolanton: “Terure, ho, terure!” li ripetis al si. “Tiu malobeos la limon”.


Staru kaj suferu silente, dum hejme viaj parencoj atendas; kaj la mateno, kiel spegulo, blankiĝas en la ĝardeno malantaŭ la bariloj; la araneaĵoj estas kovritaj per roso kaj brilo el la klara ĉielo. Vi ja suferu senkulpe, ĉar la kanajlo decidis forpreni ĉiujn kune kun ostoj. En lia

menso denove: “Tiu malobeos ĉion, ankaŭ la leĝon!” Se mi estus rigardinta atente en la okulojn de tiu ruĝharulo, mi estus mirigita – la briloj en la perkozaj viraj brunaj okuloj kuras kun fervoro tra la masivaj, kvazaŭ hakitaj el glacio, lensoj. La frunto estas oblikva kaj blonda: ĝi kontrastas kun la vangoj, trafenitaj de bruneta ombro.

La parolanto komencas minace, sed spite: de la carismo mem. Poste li transiras al solidaj aferoj: industriado, kulakismo, sabotado, grendistribuado kaj fine – “elradikigo”.

Miron Daniloviĉ estas senmezure amarigita: “Li esprimu sin rekte – donu la tutan grenon, ĉar male oni mortigos vin! – kiel predanto. Sed li rondiras kiel serpento kaj turmentas nin”.

– Ni rompos la reziston kaj forbalaos la nestojn! – la parolanto laŭtigas sian voĉon; la tero tremos, kiam ni forbalaos ĉion.



Grigorij Otroĥodin, kiel parolanto, kutimis levi la staton de sentoj al brula minaco kontraŭ la aŭskultantoj. La parolo fluis en la esprimo de sia propra justeco. Per siaj deklaroj li atakis la humilulojn, kiuj rezistis la anoncon, lumigitan de la partiaj lampoj.

– Laboruloj, batalante sub la standardo!.. – parolstampa Otroĥodin.

En lia imago, la “laboruloj” anstataŭigis la ĉeestantojn, kiuj havas ferajn kolojn; li temas pri aliaj. La instrukciaj paperoj spiras kun Aprilo, kiam li revis pri kiel feliĉaj la laboruloj fariĝus. Malproksimaj kaj senesprimaj. Sed ilia pensado kaj evoluo estas fonto de vigleco por Otroĥodin. Nome de ili, li trudas postulojn, kvazaŭ surklinge, al la semantoj, kiuj estas okule fremdaj.

La unua grupo estas kunmetita laŭregule; la polico estas ĉe la pordo: por ordo kaj influo. Vi respondas kun partia aparteno – kial la mastrumistoj senokupe promenas, lasante la aferon en la trarompo, sub la organizaj konkludoj? Ne, li estas pli forta viro ol la barĉmanĝantoj pensas. Boligante kaldronon – prenu ilin per tenaĵoj! La mortintoj leviĝos kaj, verŝinte grenon en ĉerkojn, kuros al la grendeponejo, al liaj piedoj. Ili kliniĝos aldone.

La rezolucio estas – do, plenumu ĝin! Ĝi estas en teko, sub kupraj agrafoj, proksime al via mano. Pli forta ol via obstineco.

Ĉe akcepto en la ĉefurbo, unu el la grupo preparanta sin por foriro

demandas: kio, se la kamparanoj mortos, rezistante la grenkolekton? La estro, kiu ĝis nun estis pala, kun la mieno de severa, oficiala ŝtatesto, kaj sindetene movis la manon, ellasante ŝton-malrapidajn frazojn el sub sia suĉita lipharo, subite ekstremis kaj malfermis siajn lipojn tiel larĝe, ke Otroĥodin pleniĝis de malvarmo... “Malklare!” – ekis la penso pri la “mastro”, kies okuloj tiam rerigardis, frostiĝintaj, kun glacia ruĝeco, kvazaŭ malvarmkora estaĵo de antikveco, reviviĝinte, minacis tra ili.

Otroĥodin, malfidante sian propran impreson, tuj estingis la penson. Li timis malobeon en sia memkonscio kaj aŭskultis la respondon, kvazaŭ ordonon sur granita paĝo.

– Prenu grenon de la mortintoj – tutan!

Respekto al la gvidanto estas senlima; la jako, kiel ĉe li, estas mendita, kaj la ŝablono estas duonfronta, kaj – verdeta, ĉar estas ja vera milito.

Li scias: kvankam kamparanoj aŭskultas malestime, ili timas. “Nur pensu! – la reĝoj... Skaraboj kun fragilaj cerboj: kaj ili rigardas kiel la nobelaro: kiun?”

De altaĵo, kvazaŭ de teatra scenejo, iliaj vizaĝoj estas videblaj: ĉie estas esprimoj de akra abomeno, brilantaj okuloj; angoro kaj malheleco blovas tra la halo. Kelkaj estas indiferentaj.

En la rigardo de tiu, kiu estas apud la fenestro, frapas riproĉo kun fosfora amareco de brilo, de kiu malfacilas devii.

Kontrolite: kaŝita! – de la “hinduoj”; rezisto kutime nestas ĉirkaŭ tiaj homoj.

Otroĥodin, kutime interligante esprimojn, rigardas atente la longforman vizaĝon en la akra lumo kaj ombro de la fenestro. Brovoj levitaj, kvazaŭ pro surprizo, eble – pro pacienco? Okuloj grizaj, iomete bluaj: en akra brilo.

Io, alloga pro flamiĝemo, moviĝis en la koro de Otroĥodin kaj li ekbolas; li parolas severe – en la okulojn apud la fenestro.

Miron Daniloviĉ staris kvazaŭ ĉenita al fosto. Li aspektis kiel ordinara homo; kaj lia familnomo estis kampara: Katrannik. La impreso de ĉiutaga vivo plifortiĝis ĉar li estis nerazita: li estis kaptita subite dimanĉe. Lia kranio estis mezurita laŭ alteco, kun kalvaĵoj kiuj, apud lia blonda hararo, blankiĝis super la sunbruliĝo de lia frunto kaj plilongigita vizaĝo. Liaj okuloj aspektis grizaj ĉe la fundo de siaj orbitoj, kvankam ili estis bluaj, ombritaj de liaj brovoj: ili estis de tera tono, kiel lia lipharo, kun siaj randoj

mallevitaj malsupren.

Satena ĉemizo, iam malhelblua, nun blankeca, kun restaĵoj de la originala tinkturo apud la kolumo, estis kovrita per jako de nedifinita grizeco, kiel okazas sur malnova stoplo dum sieĝanta pluvo.

Katrannik vidas tra la fenestro: ĉaro staras, ŝvitita ĉevalo estas ligita per kondukŝnuro al la barilfostoj. Ĝi provas kapti faskon da fiherboj inter ili. Ĝi kaptas ilin, turnante sian kapon kaj sendante siajn cindrogrizajn lipojn en la interspacon... “Ni jam estas kiel tiu ĉevalo!” – Miron Daniloviĉ denove turmentas la penso. – La partia linio subpremis, ni ne kaptos fiherbojn”.

La onkloj silentiĝis, kiel sunfloroj kelkfoje sub fulmotondro, kiu pendas super la duonĉielo kaj celas sagojn al la sendefenda kunveno. Otroĥodin parolante minacas per ambaŭ manoj, kaj lia larĝa ora dento, ombrita de malgranda fendeto apud ĝi, preskaŭ bruletas, kune kun la dikaj lensoj de liaj senkadraj okulvitroj, ĉe iliaj metaltleniloj.

Li frapis siajn manplatojn sur la tablon kun fajra kovrilo:

– Ni faros kiel ni farus kun niaj malamikoj, – okaze de malobeo! La familioj ankaŭ estos respondecaj...

Li frostiĝis. Roko! Partianoj kaj sovetanoj kun revolveroj en la poŝoj, same kiel policanoj kun revolveroj sur la zonoj, viciĝas por protekti Otroĥodinon. Kaj kontraŭ li – maldikularo, el kiuj nur unu havas promenbastonon: maldikan, kiel kano.

Miron Daniloviĉ klinis la kapon. Li sciis: ili subpremos; tiel okazis dum la pelado al la kolĥozoj. Oni antaŭenpuŝos al nordo, plena de larmoj, kaj ankaŭ de neĝo.

Preterpasinte la ĉevalon, la rigardo renkontas ion malproksiman kaj kontraŭan al la suno – ion, kiel signo: la malkreskantan lunon, tute cikatritan; kreta sigelo sur blua papero.

“...Bildo por ni, – pensas Miron Daniloviĉ. – Frato tenas fraton sur forkego; li frapis lin sub la brusto kaj levis lin, ĝis la morto; la desegnaĵo estas metita kiel memorigilo kontraŭ la malbono, kiu okazas, kaj ĝi plimalboniĝis, ĉar oni pereigas kune kun familioj”.

La terura premsigno senmove blankiĝas, kiel fantomo, kaj proksime – popla vico, kiel atestantoj aŭ kondamnitaj.

La koro de Miron Daniloviĉ doloras: “Lasu min pereji, sed pri kio kulpas la familio?... Kaj al kiu mi povas turni min? Kial ili venas el nenia ĉefurbo?

Ili preferus resti hejme... Nu, prenu parton da ĝi kaj lasu ion al ni; sed – ne! Fordonu la tutan rikolton kaj mem pereu. Ni ja ne iros al ili. Oni ekiru tra la tuta Moskvo kaj ankaŭ en la domon de ĉi tiu ronĝulo, kaj ekserĉu: farunon tien, terpomojn ĉi tien – ĉion, ĉion. Kaj nun vi ŝvelu de malsato! Ni ja ne iras. Eĉ se ni povus, ni ne iru. Ho, suferu sub liaj minacoj! Ĉu la patrino en la preĝejo finstaros? Ŝi timos, ke mi ĉi tie havos problemojn. Restas iom da manĝaĵo por la infanoj, fordonu ĝin – tiam ili mortos kaj ni kun ili. Ja ĉi tiuj kanajloj: donu! – montriĝas, ke ili nur volas mortigi. Ie, la infanoj, en la suno, kiel alaŭdidoj, atendas, ĉu ilia patro liberiĝos el la plago. Kompatindaj idoj! – kiu kompatos ilin, se ni foriros”.

Miron Daniloviĉ estas deflankigita de la pensoj de la parolanto. “Estas klare, kion li celas! Ni aŭdis. Nun restas nur unu celo – foriri de ĉi tie; nia plago: la partianoj konsoliĝas per ĝi, kiel lupoj per la krio de ŝafoj... Kaj dimanĉo foriris – la ordentulo ĉirkaŭbojis la mondon”.

Ekstere de la fenestro, ĉevalo kaptas fiherbojn.

“...Rigardu, ĝi estas ruza. Ne, vane! – liaj lipoj estas mallongaj kontraŭ la barilo”.

Katrannik renkontis la rigardon de la parolanto: penetranta!

Jen ili estas, malfermitaj en siaj rigardoj unu al la alia. Kiel sur mallarĝa ponteto tra abismo, aŭ pacience preterpasi unu la alian, aŭ – pereu.

Tra okuloj, etaj fenestroj, la animoj vidis, kia kompleta sincereco ilia realigos por ĉiam; kaj kial ili estas tiel malafablaj unu al la alia, kvankam multe pli proksimaj ol ili ŝajnas en malamikeco!

Katrannik sentis tian malesperon, kvazaŭ liaj nervoj estus plenaj de amaraj fajreroj. Kaj subite ĝi forbrulis. La plej kvieta paco venis, kiel sonĝo. Post ĝi, denove ĉagreno, sed jam iom lumigita de stranga intereso pri la parolanto, post nemezurebla abomeno.


Otroĥodin tuj decidis, ke la kamparano estas “malforta” kaj povus esti renversita. Estis moleco en malobeo. Kaj pro iu kialo li estis flamanta de kolero: forta kaj sovaĝa; liaj pupiloj estis turnitaj al la kamparano en la plej akra brilego. Dense brunaj sur la surfaco, ili estis sen la kutima travidebleco, kvazaŭ io ŝvelus ilin de interne en malmolan rigidecon, kiel foje okazas ĉe kuraĝaj homoj kun malvarmaj nervoj.

Kun aŭtoriteco, Otroĥodin, al kiu li certe apartenas, kie ajn li estas! - tuj moviĝus al ekstremo.

Amara rigardo estas ofta ĉe obeema kamparano! Por li, hela ŝtono

longe kuŝis sur la rando de la vivo: signo de dividita posedaĵo, pli fidinda ol juraj dokumentoj. Ĉar ĝi estas legitimita dum generacioj, sur la rando de lia animo kaj la animo de alia, signifante leĝon – por la blanka mondo de bonuloj, kiu, ŝajne, devas kolapsi. Oni decidis kaŭzi kaoson. Alia ordo enŝteliĝas, kiel arbustaro. Sen kompato, oni forŝiros panerojn el la infanaj manoj! Miron Daniloviĉ havas amaran penson: “le iu, fi’ateisto, volis rapide droni en la mono, kaj verŝante larmojn en oron, satigos sian avidecon”.

Konkludinte, Miron Daniloviĉ deturnis la rigardon de la parolanto. Parolu! Via laboro estas montrata sur la luno.



La ĉevalo pene akiras la stoplon; ĝi etendas sin per sia tuta kolo, puŝante siajn lipojn inter la tabulojn, sed ankaŭ tiu provo estas vana. Elĉerpita kaj malsata, ĝi skuas sian kolhararon de la malbonaj muŝoj, kiuj rampas en ĝiajn okulojn.

“...La palpebroj de la ĉevalo acidiĝis, rigardu, la muŝetoj svarmas, ili scias, kien grimpi: en ĝiajn malfortajn okulojn; la besto havas plagon, ĉar ties posedantoj ekstermis per laboro, kaj ne estas fojno por ĵeti; ankaŭ ni estas batitaj ĝismorte – nu, ni finatendis!”

Esperantigis Araneo

In memoriam

Nikolao N. Kriveckij

(19.12.1945 - 22.11.2005)



Nikolao Kriveckij naskiĝis la 19-an de decembro 1945 en la vilaĝo Hermakivka, Borŝĉiva distrikto, Ternopila provinco. Lia patro nomiĝis Nikolao, kaj lia patrino nomiĝis Anna. Lia patro estis soldato en la ruĝa armeo dum la Dua Mondmilito, estis vundita kaj revenis hejmen antaŭ ol ĝi finiĝis.

La malgranda Nikolao havis malfacilan postmilitan infanaĝon, sed li bone lernis en vilaĝa lernejo, studis la

francan lingvon kaj legis multe. Post fino de la mezlernejo, li eniris la Lvivan Forstinstituton (nun la Nacia Forstuniversitato de Ukrainio), kie li diplomiĝis kiel inĝeniero-lignaĵisto. Post la instituto, li servis en la armeo, laboris en meblaj fabrikoj kaj privataj entreprenoj.

Nikolao verŝajne unue aŭdis pri la lingvo Esperanto dum siaj studentaj jaroj de prof. A. Korolevych (1913-1995), fakestro de priskriba geometrio ĉe la Forstada Instituto, prezidinto de la Lviva E-klubo "Primavero", aŭtoro de "La Libro pri Esperanto" (1989).

De 1983 ĝis 2005, N. Kriveckij estris la Ternopilan E-klubon. En majo 1988, li partoprenis la Respublikanan Seminarion de E-klubaj gvidantoj kaj E-movadaj aktivuloj en Lucko (pli ol 100 partoprenantoj). En 1989, en Poltavo, reprezentantoj de la Ternopila E-klubo (M. Kriveckij, V. Pajuk, I. Galajĉuk) partoprenis la fandan kongreson de la Ukraina E-Asocio (UkrEA). En 1992, kvar membroj de la klubo (N. Kriveckij, V. Barabaŝ, V. Pajuk, I. Galajĉuk) partoprenis la 77-an UKon en Vieno (Aŭstrio), kiel parto de la ukraina delegacio, kiu estis oficiale reprezentita ĉe tia kongreso por la unua fojo.

Dank' al la klopodoj kaj persistemo de s-no Nikolao, la plenumkomitato de la Ternopila urbestro, per sia ordono datita la 23-an de januaro 1995 "Pri la Registrado de Civitanaj Asocioj", leĝigis registradon de la Ternopila urba E-klubo "Spinofloro" ĉe strato Listopadova, 2 kiel senpartia, kultura kaj eduka, volontula, neprofitcela publika organizaĵo.

Unuafoje en Ukrainio, en julio 1995, sub la aŭspicioj de Universala Medicina Esperanto-Asocio, la Ternopila E-klubo organizis la 10-an

Internacian Medicinan Esperantan Konferencon (10-IMEK), kiun partoprenis reprezentantoj de dek landoj. La konferencaj materialoj en Esperanto estis publikigitaj en scienca kolekto (108 paĝoj). Nikola Kriveckij estis membro de la organiza komitato de la Konferenco kaj tradukisto de sciencaj materialoj en Esperanton.



La 21-an de novembro 1995, ternopilaj esperantistoj solene inaŭguris originalan bareliefon al Miĥajlo Jurkiv – la aŭtoro de la unua lernolibro "Esperanto" por ukrainoj (sur la foto: N. Kriveckij, I. Galajĉuk, V. Pajuk). En la sama jaro, konstanta Esperanta ekspozicio estis aranĝita en la provinca historia muzeo. Danke al la direktoro Stepan Kostjuk (samvilaĝano de N. Kriveckij), la muzea "Esperanta fonduso" estis kreita, kiu enhavas maloftajn E-eldonojn de la jaroj 1907, 1913, 1927, 1931, ktp.

S-ro Kriveckij tradukis "el Esperanto" kaj "en Esperanton". En la formo de originala dulingva eldono, li pretigis kolekton de aforismoj de Bohdan Andruŝkiv "En la spegulo de vortoj" (1999), kolekton de poeziaj miniaturoj de Bohdan Melniĉuk "Gutoj-plus" ("2000), poemaron de B. Ĥavarivskij, ukrainigis E-poemojn de L. Zamenhof, N. Ĥoĥlov k.a. Pli ol dek kantoj tradukitaj en Esperanton estis inkluditaj en la repertuaron de la ternopila komponisto kaj kantisto Igor Vovĉak. En 2001, M. Kriveckij kaj V. Pajuk tradukis en la ukrainan la E-libron "Nova Realismo" de la moderna germana sciencisto kaj filozofo-esperantisto Bruno Vogelmann. Ĉi tiu verko estas agnoskita de sciencistoj el multaj landoj kiel koncepto por la mondo de la estonteco (la libro jam estas tradukita en 25 naciajn lingvojn).

N. Kriveckij ĉiam estis en la centro de esperantaj eventoj, kunvenoj kaj konferencoj. Ekzemple, en 1995, li organizis kunvenon de lernantoj (urba mezlernejo N 3) kun la japana esperantisto Kimie pri abako "sorobano"; en 2000, la japana esperantisto Masajuki Saionji, aŭtoro de "Yumeiho terapio", vizitis nian E-klubon. En 2001, la urba konsilantaro, laŭ iniciato de M. Kriveckij, decidis krei urban E-parkon, kaj la klubanoj eĉ sukcesis planti la unuajn vicojn de arbustoj en formo de jubilee E-emblemo.


N. Kriveckij estis respektata kaj honorata en ĉiuj E-kolektivoj en Ukrainio. Li estis konstanta partoprenanto en esperantaj kunvenoj ĉe Zbruĉ-rivero, monto Hoverla, ktp. Li estis interesa konversacianto, spritema kaj sindona al la ideo de IL E-o. Li ŝerce nomis siajn plej bonajn amikojn – "malamiko", kio signifis la plej altan fidon al homo.

La 19-an de decembro 2025, s-ro Kriveckij fariĝus 80-jara. Li forpasis antaŭ 20 jaroj. Sed la 19-an de decembro, dum la tago de Sankta Nikolao, ni (esperantistoj) ĉiam memoras nian neforgeseblan s-anon Nikolaon.

Spinosflor-anoj

Dmitro Cibulevskij

(1946-2025)



La 17-an de septembro forpasis membro de Ĥarkiva E-klubo, veterano de E-movado, Dmitrij Cibulevskij. Li esperantiĝis en 1963 jaro kaj estis fidela esperantisto, tutmonde konata, dum 62 jaroj. Kelkjara prezidanto de Ĥarkiva urba E-klubo, E-instruisto, UEA-delegito, multjara ĉef-delegito kaj fak-delegito de UEA por Ukrainio, SAT-peranto. Partopreninto de multaj UEA kaj SAT-Kongresoj, partopreninto de multaj E-aranĝoj de eksa Sovetio kaj Ukrainio. Aŭtoro de E-libroj pri E-movado, aktivuloj, instruado, poezio.

Oni diras, ke, se okazas io trista, ne plenigu la koron per doloro, parolu aŭ skribu.

Multaj niaj geamikoj esperantistoj forpasis, el ili estis konataj al esperantistaro samideanoj, kiuj foriris sufiĉe frue por sia aĝo.

Mi ne volas tranombri laŭ nomoj, sed ĉiam, kiam foriras (ne volas skribi forpasas) iu el geamikoj, en animo malpleniĝas ankoraŭ unu loko.

Kion fari, la vivo havas sian kruelan leĝon, neniu estas senmorta. Ni suferas pro forpaso de niaj karaj familianoj, (la vundoj neniam kuraciĝas) de geamikoj, de konatuloj, eĉ de iuj famegaj homoj.

La cerbo de homo ne povas akcepti, ke iam homo malaperos...

Estas tro multe da kialoj por forpasi, pereji – la malsanoj, sensencaj militoj, malfeliĉaj okazaĵoj, aĝo kaj nur unu kialo por vivi – amo kaj boneco. Mi memoras, kiel pro la disputo pri politiko de mi ofendis unu el longjaraj geamikoj.

Post ioma tempo, mi nur skribis al li, (laŭ mia kutumo per poemo), kie estis la frazo – “Eĉ se ne skribas la amik’ ne gravas, nur vivu li, nur vivo pravas”.

Ofte ni ne pretas skribi iujn varmajn vortojn al niaj geamikoj, pensante, ke li aŭ ŝi ion ne komprenos, pripensos, ke ni estas maltaktaj.

Tamen, en nia E-familio ni ne timas skribi pri niaj malsanoj, pri malsukcesoj, pri niaj feliĉaj kaj malfeliĉaj momentoj kaj ĉitio estas

bonege. Iuj geamikoj el nia Esperanto-juneco tute ne kontaktas unu kun alia.

Ĉitio ankaŭ estas nia reala vivo.

“Nenio estas eterna sub la luno”, sed gravas, ke ĉiuj vivu laŭeble longe kaj feliĉe.

Sociaj retoj donas eblecon pensi, ke iu kara homo estas vivanta, ni ne forstrekas lin el niaj geamikoj, almenaŭ iun tempon, aŭ eble neniam, ĝis ni vivas.

Jes, hodiaŭ ni tristas pro forpaso de nia kara amiko kaj deziras al ĉiuj – Estu fortaj, restu sanaj kaj esperu pri io bona por niaj gesamideanoj, por geamikoj, por niaj infanoj, nepoj, por ĉiuj, kiuj havas sian lokon en nia koro

En nia memoro, kiel en la filmo, iuj momentoj aperas ege klare, iuj ne tiel. Mi neniam forgesos, kia bonega surprizo estis, kiam Dima Cibulevskij alveturis nian urbon por partopreni edziĝfeston de lia E-amiko, mia instruisto en Esperanto, nia kara longjara prezidanto de AEA (Armena Esperanto-Asocio) Avetis Patatjan (li forpasis tro frue, bedaŭrinde). Inter nia ĉirkaŭaĵo estas homoj, pri kiuj ni povas diri “Suna homo”. D. Cibulevskij estis suna homo. Li havis bonegan kapablon altiri al si homojn. La saman pri li povas diri niaj armenaj esperantistinoj, kiuj dum longaj jaroj restis kun Dima bonegaj geamikoj. Ni ne ofte renkontiĝis kun li dum E-aranĝoj en diversaj landoj, dum UKoj de Esperanto, sed mi precize sciis, li amis nian landon.



Dum E-aranĝo en Armemio, Mezorianta Esperanto-Kunveno en Erevan, mi feliĉe ekvidis konatan karan vizaĝon kun belega rideto, kiu rapide alproksimiĝis por brakumi ĉiujn siajn geamikojn.

Estis mia lasta renkontiĝo kun kara ukraina amiko. Ni foj’ de fojo, sed ne ofte, korespondadis. Mi ne volas, ke estu minora noto en miaj rememoroj, mi nur volas rimarkigi, ke multaj niaj longjaraj geamikoj el Ukrainio, aŭ el aliaj diversaj landoj, eĉ se ne kontaktas nin, ni ĉiam pensas, ke grave estas, ke ili estu vivantaj, ke ni ekvidu, aŭ eksci, ke ĉio ĉe ili estas en ordo. Ofte multaj el ni skribas, ke seniluziiĝis en Esperanto, en Esperanto-movado, sed ekzistas bona vortkombino “Esperanto-amikeco”, kaj kedu,

ke, sendepende de la jaroj, ĝi estas, tute alia amikeco.

Kial ni distingas nian vivon kaj nian Esperanto-vivon? Eble pro tio, ke tute apartiĝas niaj rememoroj pri nia konatiĝo kun Universala lingvo, kun ideo de L.L.Zamenhof, rememoroj pri E-aranĝoj, UKoj kaj pri gesamideanoj, kiuj restas en nia memoro.



Kaj jen ankoraŭ unu vortkombino: “Esperanto-memoro”. Unu el miaj lastaj poemoj estas dediĉita al niaj karaj gesamideanoj (multaj el kiuj, ve forpasis), kaj per tiu ĉi poemo mi finos mian rakonton.

Kandel' ekbrulas ofte pli
Foriras geamikoj karaj,
En virtuala “maro” konatiĝis ni,
Kun iuj amikiĝis en reala.

Novaĵoj tristaj, ni eĉ dubas pri la ver',
Komprenas ni, sed la anim' ne kredas,
Eterna vivo ne ekzistas sur la ter',
Pri longa viv' por ĉiuj ni sincere preĝas.

Kandel' ekbrulas, mankas grava vort'
Pri niaj sentoj, pri sopir' profunda nia,
Neni' sukcesas, ĉu kruela sort?
Ve, helpos nek la larmoj, nek la krioj.

Protektu vin, la geamikoj karaj,
Lumigu la amikan rondon kiel stel',
Vi vivu, kontraŭstaru ĉiujn ŝtormojn,
Kaj...ne aperu de malĝojo la kandel'.

Rita Mkrtĉjan

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO

“Proksime al la celo”



bobelarto.ink/konkurso